

Esperanto



Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

100-a jaro • n-ro 1209 (12) • Decembro 2007

Seulo: La vojo al diverskultura komunumo



**La lingva defio:
alfronti la realon**

**Pri utileco
de maljunulo**

**Spica vizio
de Probal
Dasgupta**

**Ĝenerala
Konferenco
de Unesko**

**Roterdamo:
Kongresa
Komuniko 1**

**Postkongresi
en Afriko
kun instruistoj**

Esperanto Enhavo

Oficiala organo de

Universala Esperanto-Asocio

(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establitita kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Redaktoro: Stano Marček.

Adreso de la redakcio:
Revuo Esperanto
p/a Stano Marček, Zvolenská 15
SK-036 01 Martin, Slovakio
☎ +421 43 4222 788
✉ revuo.esperanto@gmail.com;
revuo@esperanto.sk

Aperas:
en ĉiu monato krom aŭgusto.

Redaktofino:
la 10-a de la antaŭa monato.

Legata en 115 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.

Abonprezo: varias laŭlande (EUR 36);
informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas EUR 3,50.

Anonctarifo (EUR): 1 p. 1000, 1/2 p. 550,
1/4 p. 300, 1/8 p. 165, 1/16 p. 90.
Movada rabato 50%.

Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas
duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Bankokontoj: 378964 ĉe Postbank,
Postbus 1800, NL-1000 BV Amsterdam
(IBAN: NL24PSTB0000378964
SWIFT: PSTB NL21)
42.60.51.599 ĉe ABN AMRO Bank,
Postbus 949, NL-3000 DD Rotterdam
(IBAN: NL66ABNA0426051599
SWIFT: ABNA NL2R).

Kreditkartoj:



Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ
Rotterdam, Nederlando

☎ +31-10-436-1044,
✉ uea@co.uea.org

TTT: <http://www.uea.org>

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

- 243 ... Malferme: Spica vizio (Probal Dasgupta).
- 245 ... Ĝenerala Konferenco de Unesko (Renée Triolle).
- 246 ... Pri utileco de maljunulo (Roman Dobrzyński).
- 247 ... Herzberg – la Esperanto-urbo. Mozaiko de la evoluo (Peter Zilvar).
- 248... Kongresa Komunikado 1. 93-a Universala Kongreso de Esperanto.
- 249 ... Postkongresi en Afriko kun instruistoj.
- 250 ... La lingva defio: alfronti la realon (Claude Piron).
- 251 ... Furoraĵoj de la Libroservo en Jokohamo. Internacia Kongresa Universitato.
- 252 ... Recenzoj: Baldur Ragnarsson pri *Moskvaj sonoriloj. Antologio de verkoj de moskvaj poetoj-esperantistoj*.
- 253 ... Ĵak Le Puil pri *La Fiŝkaptisto. Vojaĝo tra la poezio de Fabrizio De André*.
- 254 ... Jorge Camacho pri *L'extraordinaire diversité des langues et sa répercussion sur l'espéranto kaj Balenoj, delfenoj kaj aliaj mirindaĵoj de l' oceano*.
- 255 ... Laste aperis.
- 256 ... OSIEK-premio 2007. Oficiala informilo.
- 257 ... La morto kaj la morto de Marvin Stanley (István Ertl).
- 258 ... Tra la mondo: Al diverskultura komunumo (Kim Uson). „Diplomitaj esperantistoj“ en Brazilo.
- 259 ... Ĉinaj komercistoj kaj entreprenistoj (Ĉielismo Wang Tianyi). „Semajno“ en Katalunio (Luis Serrano Pérez).
- 260 ... Forpasoj. Anoncetoj.
- 261 ... Jarfina indekso.

KOVRILPAGE: Partoprenantoj de la 39-a Korea Kongreso de Esperanto en Seulo. Legu pli sur la p. 258 (foto: Kim Uson).

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

Prezidanto (kunordigo, ĝenerala planado):
Prof. d-ro Probal Dasgupta, LRU, Indian Statistical Institute, 203 B.T. Road, IN-700108 Kolkata, Barato; ☎ +91 33 2359 7731; ✉ probal53@yahoo.com.

Vicprezidanto (eksteraj rilatoj): D-ro inĝ. Ranieri Clerici, Via Conte Verde 66, IT-00185 Roma, Italio; ☎ +39 333 255 19 04, ☎ +39 06 97 600 326; ✉ ranieri.clerici@tin.it.

Vicprezidanto (kulturo, kongresoj, edukado):
S-ino Claude Nourmont, 2 Om Kläppchen, LU-5682 Dalheim, Luksemburgio; ☎ +352 23 66 88 64; ✉ moonmont@pt.lu.

Ĝenerala Sekretario (informado): S-ino Barbara Pietrzak, Ul. Międzynarodowa 38/40a m 217, PL-03-922 Warszawa, Pollando; ☎ +48 22 252 79 21 [h], ☎ +48 6000 51 425; ✉ pietrzak@wa.onet.pl.

Financo, administrado, TEJO: S-ino Loes Demmendaal, Duikerlaan 160, NL-2903 AC Capelle aan den IJssel, Nederlando; ☎ +31 10 213 33 20; ✉ l.a.demmendaal@planet.nl.

Landa kaj regiona agado: S-ro Hori Jasuo, 10-27 Simosinden-mati 10-27, JP-371-0822 Maebasi-si, Gunma-ken, Japanio; ☎/✉ +81 27 253 2524; ✉ horizonto@water.sannet.ne.jp.

Faka kaj scienca agado: S-ro José Antonio Vergara, Casilla 508, Puerto Montt, Ĉilio; ☎ +56 65 256660 [h], +56 65 344606 [of], ☎ +56 994521017; ✉ joseantonio.vergara@gmail.com.

Observanto de TEJO: S-ro Chuck Smith.

Observanto de ILEI: S-ro Radojica Petrović.

Spica vizio

Per salata saluto, mi aludis al specifa menuo. Sekvas la kareoj spicaj. La ĉi-foja prezento de persona vizio pri Esperanto ligas la lingvan demokration en la strategio de UEA kun sintenoj al la unikeco de la lingvo mem, kiu distingas ĝin ne nur de la angla, sed ankaŭ de Volapük kaj Interlingua. Mi komencas per ideoj de guroj miaj kaj finas per strategiaj proponoj.

La persona vizio de Renato Corsetti rilate la lingvon Esperanto emfazas la suprajn kapablojn de ĝia facila trunko. La malfacilajn vortojn de iuj branĉoj simple anstataŭu skemismaj esprimsolvoj. Lia Esperanto celas esti ĉiusektore facila, ĉiesa, universale lernebla. En Corsetti, temas pri diafana agadvojo gastama al ĉiuj kunvojontoj. Li ĝojas pri la mensa streĉo, per kiu pasiva uzanto de greklatinaj aŭ francdevenaj esprimoj aktive reformulas la koncepton per pensera rekombino.

La erudiciajn eŭfonio, repetitoro anstataŭigi per „belsoneco, lernigisto“ donas okazon por pensi mem kaj ne simple regurdi ŝablonon ie aŭditan. Esperantisto estas, almenaŭ potencie, memstara pensanto. Uzi gastigformatan lingvon malfermas min al la eblo, ke mi, konscie uzante ĝuste tiun ĉi lingvon, praktiku la gastamon. Mi foje forgesas, kaj enfalas de la pripensado en rutinemon. Sed la korpo de „la voj“ elektita rekomunikas al miaj piedoj ritmon pripensan, revekan.

En la vizio de Corsetti, ĉiu ago uzi aŭ reuzi tipe Esperantan reesprimon de maldiafana vorto el „la okcidenta dialekto“, kiel nomis ĝin Claude Piron, estas universaliga laboro de efika gastejfarado por novaj uzantoj. Temas do labori ne nur pri aŭ per aŭ por Esperanto. Ĉe Corsetti, la uzado mem de nia unika lingvo estas kultura agado, se ni flegas ĝian unikon. Tiel konstruante kaj konservante neŭtralan interkulturan espriman gastigejon por la homaro, oni donas palpeblan formon al la homa rajto pri la lingvaj demokratio kaj diafaneco. Sen nia agado, neniu konscios pri tiu rajto disponi unikan planlingvan gastigejon.

Kiamaniere ni, kiuj uzas kaj kapablas flegi nian interlingvon, rilatu al tiu kultura laboro? Ĉu ni anhele laboregu, kun sento de urĝo, timante, ke eble iu rivalo minacas okupi nian celteritorion, invadi niajn korojn, amase kabeigi nin? En mondo sen kredindaj rivalaj interlingvoj, la „nokta fantomo“, kiu nin timigu, estas la angla, ĉu? La demandoj eĉ ne formuliĝus, se iuj ne simptomus timon pri la pluportiĝo de nia torĉo. Mi konas tiajn simptomojn ankaŭ en Kolkato: multaj bengalaj gepatroj, vidante la anglemon de siaj infanoj, pesimismas pri la sorto de la bengala. Sed la simptompportantoj, almenaŭ en Esperantujo, bonvolu atenti



kelkajn komparajn demandojn, kiuj helpu alfronti rekte tiun maltrankvilon.

Kial vi serioze timas, ke, vidante multege pli da homoj ekuzi la anglan internacie, vi kolektive ne plu volos uzi Esperanton? Imagu, ke nur vi estus kapablaj kanti, kaj ke la publiko ĉirkaŭ vi neracie kliniĝus al ĥora deklamado de versoj ĝuste tie, kie vi vidas la interhoman neceson de la kunliga kantado. Imagu, ke la kantadon multaj najbaroj ridindigus kiel artefaritan stultajon ĉe homaro nature parolema. Ĉu vi pensus: „Nu, ĉiuj adoptas la ĥoran deklamadon, primokas la valoron de la kantipovo; tial ni cedu al la monda opinio kaj senkantiĝu“?

Kompreneble ne! Vi des pli vive komprenus la unikecon de la talento, kies flegadon vi daŭrigus. La batoj de l' sorto kaj moko de l' homoj estus por via voj' elektita perkutaj akompanaĵoj. Konante bone vian amon de la kantarto, vi agnoskus ĝian unikecon kaj iaman plivastigeblon. Tamen vi jes bezonus rekompreni vian vojon, por vigle daŭrigi post la ekkonstato, ke la survoja trafiko estos alia ol vi pensis.

Simile iam rekomprenis sian vojon la praktikantoj de la jogo. En la antikva Barato, la jogarton praktikis religie trempitaj intelektuloj, el kiuj elektis mentorojn kaj konsilantojn la reĝoj. Poste, kiel konate, la joganoj perdis tiun potencon. Tamen evidentiĝis bezono pri la jogo en la moderna mondo. Ĝiaj praktikantoj kaj instruantoj, rekomprenante sian rolon, prezentis ĝin al novaj publikoj kiel ekzercon de kuraĝo malhaste kaj konscie spiri, pensi, malpensi. Nun la jogarto refloras, kvankam la modernajn principojn apenaŭ mentoras jogmajstroj.

Tia sama rekompreno fasonindas por la Esperanta arto – kiu invitas komparon kun la muziko pli ol kun la jogo, ĉu ne? Esperanto estas tiu muziko de la homaj lingvoj, pri kiu la ĝenerala publiko ankoraŭ ne uzas takso-kriteriojn seriozajn. Ni scias la valoron de la muziko, kiun ni praktikas; sed eĉ ni ricevis tiun scion de nia sperto, ne de la inicintoj.

Kiam oni incis nin, oni iom insiste ligis Esperanton al la potencocela penso, ke ĉiaj interetnaj laboroj fariĝos per ĝi (ĉar, oni diris, la rivalecoj inter la nacioj malebligis la grandskaliĝon de la naciaj lingvoj). Sed ni proprahaŭte spertis la fakton, ke la praktiko de „la bona lingvo“ Esperanto – kiel ni lernis de Piron rebapti ĝin – temas ne ĉefe pri veraj aŭ imagataj geopolitikaj bataloj. La unikeco kaj nemalhaveblo de nia ŝlosilo al la homa fenomeno Lingvo estas atuto sendependa de la neracieco en la lingva konduto de la mondaj instancoj. Via elektroliveranto foje

malracie fakturas; ĉu pro tio vi ĉesas ludi la elektran gitaron?

La rekomprenon, aparte klaran ĉe Piron, Corsetti kaj la forpasinta Akiko Nagata-Woessink, spice resumas la formulo „internOcia lingvo“. Tiuj guruoj emfazis la suplecon de la afiksriĉa trunko. La tabelvortoj estas nur unu montrofenestro por tiu tabela magiilaro, kiu surprize kapablas la plimulton de la esprimaj laboroj. La lingvosimplema Corsetti, inspiranta nin discipline paroli la tabelan, emfazas la skemisman vivantigon de la afiksoj kiel la bazan novajon en la zamenhofa ilaro. Ĝuste tie donaciĝas al ni internocia lingvo, kies konkretan guston neniu suspektas antaŭ ol sperti ĝin.

Mi kuraĝas sugesti, tamen, ke ni preteriru tiun recelebron de la skemismo. Estas internocia ankaŭ la rilato inter la discipline tabelaj *du-senc-a*, *dis-er-ig-o*, *sub-tegment-o* kaj tiuj *ambigua*, *analizo*, *mansardo*, kiujn mi kontrapunkte nomos anarkie „babelaj“. La afiksema tabela Esperanto estas sufiĉe forta digestanto por povi asimili en spican vivadon ankaŭ la babelajn esperantigojn, kiujn el fremdaj fontoj venigas la dekkvina regulo de la praavgramatiko. Ĉi tiu asimilkapablo radikas en tiu frua kompromiso, kiu donis al Esperanto unikan niĉon en la eŭropa geografio.

Michel Duc Goninaz, franco bone scianta la rusan, foje emfazis, ke en la konsisto de Esperanto rolas la specife orienteŭropa akcepto de vortoj ĉefe latinidfontaj kaj parte ĝermanaj. Tiun ikonon akcepton, similan al la iama latina prenado el helenaj fontoj, Esperanto disponigas al la tuta mondo. Temas pri tio, ke enkarnigante tiun ĉi modelon de akceptado de okcidentaĵoj en la eŭropa oriento, la konsisto de Esperanto ekzemplas la kreaĵon akceptadon mem fare de ajna prenantaro el ajna fonto.

Kiam la tabela trunko internocie altradukas al si la babelajn branĉojn en nia unika lingvilo, historie rolas do specife orienta asimilo de okcidenteroj – sed en la skemisma formato, kiu unikigas nian muzikilon.

Provante doni al nia muzikilo rajtan lokon en la nuntempo, ni foje tro streĉas nin por realigi mallarĝe konceptitajn celojn, kolizias kun la gustoj de najbaroj ne lernintaj kunmanĝi niajn bakajojn, kaj komencas malĝoĝi. Sed la Strategia plano de UEA, fundamente celanta al la lingva demokratio, temas ĝenerale pri la defendado de la prilingvaj rajtoj kaj pri la laŭebla rolo de

Esperanto en tiu strebo al pli justa mondo. Temas kongrui tiun memkomprenon kun niaj kapabloj – kaj kun la unikaj virtoj de nia virtuoza muzikilo.

Por plijustigi la geometrion de la lingva aliro en la nuna mondo, ni devas atenti la demandon de diafano, analizeblo, alireblo de vortoj/stiloj – ankaŭ ene de la etnaj lingvoj. Tie la akre malsamaj tavoloj de la nacia leksiko kreas akirajn malfacilojn por la lernejoj kaj iuj plenkreskuloj. La batalo kontraŭ la analfabeteco formuligas nove, se ĝi donas taŭgan rolon al la konkretaj iloj disponeblaj ĝuste en nia internocia lingvo. Esperanto unike pontas – algebre inter la tabela kaj la babela, geometrie inter la latinida korpo kaj la slava etoso.

Komprenoble niaj instituciaj agemoj, entagordigitaj en la Strategia plano de UEA, devas daŭre strukturi nian rilaton kun la monda publiko, kiu perceptas nin unuavice ligitaj al alternativaj vojoj en la internacia komunikado. Ĝuste tial reemfazindas la kontinueco kun antaŭaj streboj. Sed samtempe gravas hodiaŭigado de kompreno, por ke tiu kontinueco ne paŭsu eksvalidajn rutinojn, sed havu sencon.

Por fini mi skizu tri elementojn (pliklarigotajn en postaj eseoj) de strategioj donontaj konkretan formon al la internocieca spicigo de Esperanto. Por ke la struktura laborado de UEA trafu fari el la pedagogio ne nur ilon sed seriozan laborejon, ni devas daŭrigi la jam (sed sen ĉi tia pripenso) komencitan instaladon de tri karakterizaj bazoj, kiuj donu al Esperanto unikan identigeblon kiel novtipa laborilo: (a) ponta tradukado, (b) interliteraturo, (c) prinorma intertraktado. Jen rapidaj fotetoj de la menueroj.

Sub (a) mi komprenas almenaŭ la kroatan modelon proponadi al retradukemaj alilingvanoj esperantigojn de nacilingvaj tekstoj.

En (b) mi imagas ejon de nova aŭtodidaktismo. Por fasoni memstaran kaj ne nacisklavan individuecon, serioze hodiaŭaj gejunuloj bezonas interkulturan vivejon. Por servi tiun bezonon, necesas minimume rete disponigi multajn Esperantajn tekstojn, originalajn kaj tradukajn, en plejble multaj sferoj, por ke reviglu la memklerigila lingvo, per kiu iam klerigis sin Miyamoto Masao. Malpli retkonektitaj medioj bezonas aliajn solvojn, ne nepre nur la tradiciajn.

Ĉe (c) mi krisignas tiun publik-spaco-konstruan stilon, kiun

Esperanto eksportu al la etnaj lingvoj, por ke tiuj transformiĝu al liberesprimaj spacoj. La esperantistoj scipovas senĉese intertrakti pri lingvaj kaj edukaj normoj. Ni ne evoluu en 999-an etnan lingvanaron. Male, la etnaroj lernu de ni tiun stilon de intertraktado.

Ĉi tiujn fotetojn grandigos postaj tekstoj. Viaflanke, bonvolu komenti. Tiel vi kunkovos kun ni utilan, ĝeneraligeblan, hodiaŭan formon de tiaj rekomprenoj de pozitiva rolo por Esperanta movado – en tempo, kiam ne verŝajnas la baldaŭa ĝenerala adoptiĝo de nia lingvo por oficialaj interŝtataj laboroj, kvankam ni ne ĉesos labori por tiu ideo.

Probal Dasgupta



Imagu, ke la kantadon multaj najbaroj ridindigus kiel artefaritan stultadon ĉe homaro nature parolema... Sur la foto de Amri Wandel nia Internacia Koruso kantas dum la Internacia Arta Vespero en Jokohamo.

Ĝenerala Konferenco de Unesko

La konferenco okazis en Parizo de la 16-a de oktobro ĝis la 2-a de novembro 2007. Novalveninto estas Montenegro dum revenis Singapuro. La nombro da reprezentantoj kaj ilia aktiva partopreno multe dependas de la landoj, de ilia riĉeco aŭ parlamenta kulturo.

Nur kvindek da Neregistaraj Organizoj sendis delegitojn. Inter ili UEA estis reprezentita de sia vic-prezidanto Ranieri Clerici kaj de siaj reprezentantoj Renée Triolle kaj Barbara Despiney, kiuj faris sian eblon kontakti, informi, konvinki la delegaciojn, voki al kunlaboro aŭ subteno.

Ĝenerale la akcepto estas tre bona, kaj la fakto, ke plej ofte la homoj ricevas dokumenton en sia lingvo, tre aprezata. ILEI perdis la oficialajn rilatojn, sed ĝia deziro iĝi observanto bone reklamis, ĉar la Pleno devis diskuti kaj aprobi!

Nova tendenco estis interveni en la propra lingvo, tiel la Prezidento de Bulgario en la bulgara, la Prezidento de Grekio en la greka, la Prezidento de Montenegro ... en la ...? (interpreta silento, ĉar li ne anticipi provizis la interpretistojn per teksto en unu el la 6 oficialaj lingvoj), la vic-ministro pri eksteraj aferoj de Italio en la itala, la Ministro pri Edukado de Brazilo en la portugala ktp. Nur la reĝo de Svedio intervenis ... en la angla, same la Ministro pri Edukado el Jordanio, sed post publika rimarko de nia delegito, li poste parolis nur arabe.

Ĉar drasta estas la buĝeto, en ĉiuj fakoj la kostoj de la salajroj superas, ofte duoble, la sumon disponigotan por la programoj. Pro tio ankaŭ la tendenco krei oficejojn ekster la



Parto de la partoprenantoj dum la inaŭguro

pariza sidejo: duobla gajno, la lando, kiu ricevas tiun oficejon (ekz. ĉi-jare Grekio kun oficejo pri sporto kaj virinoj), fieras pro la gloro, sed ankaŭ komplete fincas ĝin.


La nuna tasko de la Ĝenerala Direktoro estas reorganizi la tuton; inter la organizaĵoj de UN, Unesko tute klare konservas Edukadon kaj Kulturon, kaj interese estas, ke UN komisiis al la fako „Kulturo“ de Unesko zorgi pri la „internacia Jaro de la Lingvoj“ 2008: tre klaras do la ligo inter lingvo kaj kulturo, pri kio batalas UEA kaj TEJO de pli ol 40 jaroj. Same la 60-jariĝo de la Homaj Rajtoj koncentriĝos al la Rajto pri Lingvo, rajto aliri la progreson de scienco, partopreni en la kultura vivo ks; alidire batalkampo de UEA en la komisiono antaŭ 35 jaroj!

Ne mankos al UEA kaj ĝiaj landaj asocioj laboro dum 2008: vivigi kontaktojn kun la landaj komisionoj de Unesko, konsciigi aliajn asociojn pri lingvo-diskriminacio; pledi ĉe la registaro por demokrata lingvo-instruado; partopreni la oficialajn festotagojn (la 21-a de februaro: tago de la Patrino Lingvo; la 8-a de marto: Virina Tago; la 21-a de marto: Tago kontraŭ rasa diskriminacio; la 3-a de majo: Tago por libera gazetaro; la 16-a de novembro: Tago por Toleremo; la 10-a de decembro: Homaj Rajtoj) kaj raportoj pri la agado, ne forgesante subskribigon de Manifesto 2000.

Renée Triolle



Parolas (bulgare) la Prezidento de Bulgario



Ranieri Clerici,
Renée Triolle,
Monique Arnaud
kaj Jean-Pierre Boulet

Pri utileco de maljunulo

Mi honteme veturis al Vjetnamio kaj pripensadis, kiel kontrabandi miajn maljunajn ostojn al la 63-a Internacia Junulara Kongreso en Hanojo. Nu, en la prahistoria epoko mi estis vicprezidanto de TEJO; la alia senkulpiga preteksto estis la pli frue planita renkontiĝo kun teamo tradukanta mian libron „La Zamenhof-strato” en la vjetnaman lingvon. Tamen atinginte la kongresejon, mi sentis min vera dinosaŭro.



Komitato de TEJO en la akvo de la mirinda golfo Ha Long

Por atingi Hanojon, mi devis de Pekino tra la tuta Ĉinio vojaĝi per trajnoj kaj busoj. Tiu ekspedicio postlasis spurojn sur mia vertebraro. Ĝi manifestis sian ekziston, kiam mi atingis dormoĉambron kun ok litoj starigitaj po du unu super la alia. Ĉiuj malsupraj litoj estis jam okupitaj. Vole-ne-vole mi devis grimpi supren. Heroe atinginte la celon en gloro kaj doloro, mi konstatis mankon de matraco; anstataŭis ĝin lignaj tabuloj kovritaj de rizpajla plektaĵo. En la infera varmego mi pene etendis miajn dolorplenajn ostojn sur la malmola lignaĵo. Ĝi altrudis la penson pri ĉerko kaj donis la senton fariĝi martiro de nia afero en la tempo de paco. Granda ventumilo turnis freneze siajn manegojn super mia korpo, el kiu ŝvito torente fluis kaj aŭguris pulmoinflamon aŭ eĉ pli rapidan morton.

La instinkto de memkonservado ordonis agi. Mi pene malsupreniĝis por serĉi matracon, sed oni tute ne komprenis mian postulon. Finfine estis mi, kiu devis kompreni, ke dormi en la vjetnama varmega kaj humida aero sur matraco, signifas ŝanĝi ĝin rapide en ŝvitspongon, dum la rizpajla plektaĵo ne retenas ŝviton. Cetere ĉiu saĝa homo scias, ke vertebraro

preferas malmolan ol elastan liton. Tiun ĉi aserton baldaŭ konfirmis ankaŭ miaj meritplenaj ostoj. Fakte al resaniĝo de mia vertebraro kontribuis ankaŭ „Yumeiho-terapio“, kiu dum la 63-a IJK estis ĉiutaga programero. Ĝi konsistis el teoria parto kaj ankaŭ praktika demonstrado, en kiu mi kuraĝe volontulis. La terapio egalas torturadon, sed mi senĝeme suferis, por manifesti utilecon de maljunuloj dum la junulara kongreso.

Mian planon helpis la kulturaj cirkonstancoj tipaj por la Fora Oriento, kie la maljuneco ne estas hontinda afero, male – grandaĝuloj ĝuas respekton kaj helpemon. Tiun tradicion verŝajne favoras la fakto, ke maljunaj homoj ne estas tiel ofte videblaj kiel en Eŭropo. Rezulte en Vjetnamio oni facile liberiĝas de la dionosaŭra komplekso. Cetere mi devis iom redukti la mankon de polaj gejunuloj en la 63-a IJK, helpate nur de unusola alia polo, Pŝemo Grzybowski, universitata profesoro el Bydgoszcz. Malfacila tasko, ĉar ni ambaŭ aĝas sume 108 jarojn. Alivorte averaĝa pola partoprenanto de la junulara kongreso havis 54 jarojn.

Tamen mi decidis plonĝi en la junularan etoson, kies natura elemento en varmega klimato estas malvarma biero. Dum oni estas drinkanta la duan duonon de botelo, la unua jam banas vian tutan korpon. La procedo devas esti daŭre ripetata kaj ĝia financa efiko kalkuliĝis en milionoj. La 63-a IJK donis plezuranton ĝin milionulo. Por taksiveturo el la flughaveno al la urbocentro oni pagas 200 mil dongojn. La aktualaj prezoj, kvankam plurciferaĵoj, fakte estas tre malaltaj. Vjetnamio rapide evoluas kaj verŝajne baldaŭ stabiĝos ĝia financa sistemo. Do, urĝu, se vi volas ĝui la bonstaton de Rockefeller kaj elspezi milionojn.

Ne mankas aliaj allogaĵoj en tiu lando. La plej okulfrapan bildon prezentas la larĝaj avenuoj de Hanojo. Ili ŝajnas riveroj, en kiuj anstataŭ akvo fluas konglomeraĵo de bicikloj, motorbicikloj kaj skoteraj. La urbego logas ekskursemulojn per sia riĉa turisma oferto, interalie la belega parko kun la maŭzoleo de Ho Chi Minh, kiun oni rajtas viziti nur dece vestita. Partoprenantoj de la kongreso ofte ekskursis. Ĉiuj veturis al la unika natura mirindaĵo, la golfo Ha Long.



Vjetnamino kaj japano

Ĝuste la kongresaj ekskursoj donis al mi, maljunulo, ŝancon montriĝi utila, kiel trejnisto pri konversacio. La kongreso estis bona okazo por tutsemajna paroliga kurso.

Inter la vjetnamaj partoprenantoj aparte videbliĝis 30-kapa grupo de helpantoj. Ili ĉiuj estas studentoj de la Hanoja Fremdlingva Universitato. Ĝiaj ampleksaj konstruaĵoj servis kiel kongresejo. Oni tie dormis, manĝis, debatis kaj realigis preskaŭ ĉiujn programerojn. Ĉiuloke oni vidis la helpantojn, kiuj vestitaj per verdaj bluzoj kuris tien kaj reen aŭ staris deĵore. La tuta grupo komencis lerni Esperanton duonon de jaro pli frue, sed multaj el ili tute bone kapablis interkompreniĝi en la lingvo internacia. Ili avide serĉis eblojn konversacii, sed ofte ne povis trovi favoran okazon, ĉar mankis partneroj por interparolo.

Granda parto de la aktivuloj de TEJO estis daŭre okupitaj pri realigado de la kongresa programo, ili debatis, kunvenis, prelegis ktp. Cetere gejunuloj pro sia naturo ŝatas restadi pare aŭ en amikaj rondoj, ili interparolas fluan Esperanton

kaj iusence fortimigas nememfidajn komencantojn. En tiu situacio la dinosaŭraj partoprenantoj ŝajnis ĉielsenditoj laŭ inspiro de la Zamenhof-spirito.

Mi estis daŭre sieĝata de la vjetnamaj gejunuloj kaj babilis, babilis ĝis doloro de makzeloj kaj plezure observis, kiel la komencantoj, kiuj neniam antaŭe parolis kun eksterlandanoj, transformiĝas al fluparolaj esperantistoj.

En tiaj cirkonstancoj oni forgesas pri sia maljuneco. Cetere demandite, kiom da jaroj mi havas, mi kutimis respondi: „Cent!” Kaj oni kredis. Ja por 20-jarulo ne ekzistas principa diferenco inter homo 60- aŭ 100-jara. Foje mi tamen aŭdis komplimenton: „Kiel centjarulo vi tute bone fartas.” Kelkaj gejunuloj ne volis kredi. Por tiuj estis alia klarigo: „Fakte mi havas cent jarojn, sed tio estas suma aĝo de kvin junuloj, kiuj konsistigas min.” La kurso de Esperanto komencita en Hanojo ne finiĝis. Danke al modernaj komunikiloj plu okazas babilado inter Metuŝelaĥo el Varsovio kaj Minh Thu, Bui Phuong kaj aliaj gejunuloj el Hanojo.

Roman Dobrzyński

Herzberg – la Esperanto-urbo

Mozaiko de la evoluo

En Jokohamo UEA honorigis per la Diplomo pri Elstara Agado la germanan Interkulturan Centron, agantan en la urbo Herzberg, kiu ricevis la oficialan kromnomon „La Esperanto-urbo“ (v. revuo *Esperanto*, jan. 2007, p. 4, 5).

Oni jam scias pri instruado de Esperanto en la surlokaj lernejoj, oficiala uzado de Esperanto kiel komuna pontlingvo kun la pola ĝemelurbo Góra, pri la internaciskala agado de Interkultura Centro Herzberg (klerigejo de GEA), esperantlingvaj vojindikiloj al la Esperanto-Centro, kelkaj grandaj dulingvaj ŝildoj sur urbaj domoj, sed eble por multaj estas novaĵo la ofertoj de lokaj restoracioj: pluraj manĝokartoj en Esperanto kaj eĉ la unuaj manĝaĵoj kun Esperanto-nomoj!

Inter la sukcesoj estas ankaŭ la kresko de materialoj en la fakbiblioteko kun arkivo (dankon al la donacintoj kaj helpantoj, kiuj prizorgas la plibonigon de nia elektronika katalogo), kaj la multnombraj partoprenantoj ekz. dum la Metodika Semajno kun Katalin Kováts (edukado.net) kaj Pedagogiaj Tagoj (Torpedo-3) kun Stefan MacGill, Chuck Smith kaj Gerald Tucker, la bela inaŭguro de la monumento al la Esperanto-pioniro el Herzberg, Joachim Gießner, dank' al la internacia fervojistaro (sur la fotoj).

Herzberg multon faras ankaŭ por la E-lingvaj turistoj: la promen-rondvojoj en

la urbo, ekz. apud la du riveretoj kaj lagoj (t.n. „Akvo-8“) kun esperantlingvaj resumtekstoj pri la historio kaj nuntempo, estas pretaj kaj certe esplorindaj kaj fotindaj. Pretas ankaŭ esperantlingva informbroŝuro pri vizitindaĵoj kaj la unuaj Esperantaj bildkartoj.

Nun ni instruas al la unuaj turismaj gvidantoj Esperanton, kiuj laŭ niaj planoj povos jam prezenti ZEOJ-n kaj vizitindajn lokojn al turistoj ekz. antaŭ la UK 2008 en Roterdamo, ŝatontaj vidi

propraokule la novaĵojn. La gvidantoj kaj la fiera urbestro planas ankaŭ bonvenigi la esperantlingvajn gastojn, kiuj venos al la Internacia Feriosemajno (kun varia programo inter 11-18 jul 2008) kaj al la samtempe okazonta INA-konferenco (de Internacia Naturkuraca Asocio).

Pli da informoj pri la Esperanto-urbo aperados sur la nun konstruata hejmpaĝo: <http://esperanto-urbo.eu>. Interesiĝantoj povas peti E-lingvajn broŝurojn, informojn pri tranoktado kaj servoj, aligilojn aŭ de la urba Turisma Oficejo, aŭ de la Interkultura Centro. Bonvenon!

Peter Zilvar





Kongresa Komunikado 1

93-a Universala Kongreso de Esperanto

**Rotterdam, Nederlando,
19-26 julio 2008**



Konstanta adreso

Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Tel.: +31 (0)10 436 1044; fakso: +31 (0)10 436 1751. Retadreso: kongresoj@co.uea.org.
TTT: http://www.uea.org/kongresoj/uk_2008.html.

Kongresa temo

Lige kun la Internacia Jaro de Lingvoj la temo de la 93-a UK estos „Lingvoj: trezoro de la homaro”. Ankaŭ la 100-jariĝo de Universala Esperanto-Asocio ricevos multe da atento en la programo (vd. *Esperanto*, novembro 2007, p. 219-220).

Informoj

Por aliĝoj kaj mendoj servas la kongresa retejo de UEA:
http://www.uea.org/kongresoj/uk_2008.html.

Kongresejo

La programeroj de la UK okazos ĉefe en la kongresejo Beurs-WTC (Borso – Mondkomerca Centro) en la koro de Roterdamo ĉe la urba ĉefstrato Coolsingel. En ĝia ĉirkaŭaĵo okazos multaj someraj aktivajoj, kiujn eblos senpage spekti, i.a. aviadila spektaklo (19-20 julio) kaj karnavalo (26 julio).

Vojaĝado

Estas facile veturi al Roterdamo trajne, aŭte kaj aviadile. Fervoje ĝi estas atingebla i.a. per rapidegaj trajnoj el Parizo kaj, kun ŝanĝo en Bruselo, el Londono. La ĉefa flughaveno por veni al Roterdamo estas la Amsterdama internacia flughaveno Schiphol, de kie trajnvetruo al Roterdamo daŭras 45 minutojn. Rektaj flugoj al Roterdamo estas i.a. el Ĝenevo, Ĝirono, Hamburgo, Londono kaj Romo.

Loĝado

Detalaj informoj aperos en la *Dua Bulteno*.

Ekskursoj

En la *Dua Bulteno* aperos priskriboj pri la antaŭ-, post- kaj dumkongresaj ekskursoj. Inter la vizitotaj lokoj estos la kampara nordo kaj la fiŝista sudo de Nederlando, la giganta digo Afsluitdijk kaj Amsterdamo. Dum pluraj ekskursoj eblos konatiĝi kun la kongresa urbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo.

Infana Kongreseto

Se sufiĉe da infanoj aliĝos, dum la UK okazos Internacia Infana Kongreseto en Oostvoorne, 35 km de Roterdamo.

Interesitoj bv. kontakti la komisiiton pri IIK, Bert Schumann, bert.schumann@free.fr, por pli da informoj.

Esperantologia Konferenco

La temo de la 31-a Esperantologia Konferenco estos „Esperanto kompare kun aliaj lingvoj – kontrastlingvistikaj kaj socilingvistikaj aspektoj”. Proponojn pri kontribuajoj akceptas d-ro Detlev Blanke, dblanke.gil@snafu.de.

Reklamiloj

La *Unua Bulteno* estas senpage ricevebla ĉe UEA. Glumarkoj kun la kongresa emblemo estas mendeblaj ĉe la Libroservo de UEA. Folio kun 12 markoj kostas 1,20 eŭrojn. Oni ricevas rabaton de 1/3 ekde 3 folioj. Aldoniĝas la sendokostoj kaj por EU-landoj imposto de 19%. La kongresa afiŝo estas elŝutebla el la retpaĝo http://www.uea.org/pdf/roterdama_afisho.pdf.

Aliĝilo

La aliĝilo estas ricevebla ĉe la perantoj kaj ĉe UEA, kiu volonte liveros ĝin grandkvante por distribuado kun E-gazetoj kaj en E-aranĝoj. Eblas elŝuti ĝin en PDF-formato ĉe la kongresa TTT-ejo, kie eblas ankaŭ rete aliĝi al la UK.

Kotizoj

Ĝis la 31-a de decembro 2007 validas jenaj kotizoj (interkrampe tiuj por la landoj de tarifo B): Individuaj Membroj de UEA (sed ne MG) EUR 160,00 (120,00); MG-membro aŭ ne-IM de UEA, EUR 200,00 (150,00); Komitatano/kunulo/junulo/handikapulo, IM de UEA, EUR 80,00 (60,00); Kunulo/junulo/handikapulo, ne-IM de UEA, EUR 120,00 (90,00). Infanoj kaj junuloj naskiĝintaj post la 31-a de decembro 1987 aliĝas senpage (bv. sendi kopion de dokumento!). Pagmanieroj troviĝas en la aliĝilo, *Jarlibro 2007* (p.36-37) kaj en la TTT-ejo.

Statistiko

Ĝis la 15-a de novembro aliĝis 332 kongresanoj el 42 landoj.

Postkongresi en Afriko kun instruistoj

Pluraj esperantistaj aranĝoj okazas en diversaj landoj, en diversaj kontinentoj, esperantistoj migradas tra la tuta mondo el unu renkontiĝo al alia, konatiĝas kun diversaj homoj, kulturoj, starigas personajn kontaktojn, kunlaboras ankaŭ en profesia nivelo – jen por kio ni nepre bezonas internacian lingvon kaj jen pro kio ĝi disvastiĝas el lando al lando, el kontinento al kontinento.

Preskaŭ en ĉiu kontinento oni povus signi plurajn verdajn steletojn, kie jam okazis grandaj internaciaj aranĝoj: UK, SAT-kongresoj, ILEI-konferencoj, Lingvaj Festivaloj k. a. En diversaj aranĝoj oni povas renkonti reprezentantojn de ĉiuj kvin kontinentoj. La ĉefa esperantista aranĝo estas la ĉiujara UK. Sed ne por ĉiuj tiom facilas veni, – pro tio varias landoj kaj kontinentoj.

Tamen, en niaj E-aranĝoj ni vidas nur malmultajn samideanojn el Afriko, malgraŭ tio ke ili havas grandegan volon veni, partopreni, sperti, lerni, informiĝi, kaj tion kunporti al siaj landoj, disdividi kun lokaj samideanoj. Malfacilas ricevi vizojn, malfacilas kolekti monon por la vojaĝo. Pro tio venis tempo por pensi pri alternativo kaj ILEI akceptis la defion – konferenci en Afriko, tuj post la UK en Roterdamo. Tiu ĉi novaĵo devus esti tre bona por niaj afrikaj samideanoj: grava internacia aranĝo, la ĉefa jara renkontiĝo de instruistoj, venas al Vi!

Karaj afrikaj amikoj, vi nun havas la eblon veni al la aranĝo pli facile ol kutime (ne tiom multe koston la vojaĝo, ne tiom malfacilas akiri vizon, speciale por vi estos rabatitaj prezoj) kaj vi havos la eblon lerni de spertaj esperantistoj, instruistoj, konatiĝi

Portonovo: kunvenejo en Sohghai-Centro kaj (sube) dometo kun hotelecaj ĉambretoj. Fotoj: Zsófia Kóródy.

La 41-a Konferenco de

ilei

29 jul – 05 aŭg 2008 en Portonovo, Benino

„Instruistoj de Esperanto por la Planedo Tero“

ne nur kun Benino kaj kulturoj de viaj najbaraj landoj, sed ankaŭ kun homoj kaj kulturoj ekster via kontinento, partopreni en prelegoj, seminarioj, diskutoj...

Karaj samideanoj de aliaj kontinentoj, vi estas invitataj partopreni la ILEI-Konferencon por omaĝi kaj kuraĝigi la lokajn samideanojn, doni instigojn al iliaj pliaj paŝoj. ILEI-Konferenco en Afriko estos grava evento kaj por la E-movado entute, kaj por la historio de

ILEI, same kiel por la E-movado en Afriko. Por partoprenantoj el aliaj kontinentoj okazos kultura kaj ekskursa postkonferenca programo kun vizito al aliaj apudaj landoj. Pliajn informojn bonvolu serĉi en *Internacia Pedagogia Revuo* 4/2006, 2/2007, 3/2007 kaj 4/2007 kaj sekvajn en la jaro 2008, ankaŭ en la retejo de ILEI www.ilei.info.

Por la konferenca programo oni antaŭvidas tradiciajn programerojn: inaŭguron, komitatkunsidojn, estrarkunsidojn, ekzamenojn de ILEI/UEA en elementa kaj meza niveloj, Interkonan Vesperon, Nacian Vesperon, Internacian Artan Vesperon, Solenan Fermon. Okazos ankaŭ tradiciaj programeroj kiel unutaga Scienca Simpozio laŭ la konferenca temo, konatigo de lokaj aŭtoritatoj kaj intelektuloj kun Esperanto-medio en certa nivelo, kaj ebligado de daŭra kunlaboro de esperantistoj kaj ne-esperantistoj; Lingva Festivalo (prezento de lingvoj kaj kulturoj fare de partoprenantoj de la konferenco el diversaj landoj) – laŭeble publika, kiel donaco de esperantistoj al lokaj loĝantoj kaj unu el la formoj de kunlaboro kaj konatiĝo kun loka medio, ankaŭ kiel efika varbilo por nia lingvo; bankedo – komuna vespermanĝo en lukseca amika etoso, nepre kun afrika vino; vesperaj renkontiĝoj kun kultura programo.

Financa helpo por subvencii la partoprenon de instruistoj kaj instrukapbligadon de junaj instruistoj el Afriko bonvenos al la konto de ILEI ĉe UEA (ilek-a) aŭ al Afrika Fondaĵo de UEA, ĉiam kun la indiko: „Benino 2008“.

La organizantoj

La lingva defio: alfronti la realon

Claude Piron aperigis en interreto („Youtube“) serion de dek franclingvaj elsendoj pri la lingva problemo, laŭgrade kondukantaj al la solvo „Esperanto“. Sur la retadreso www.dotsub.com/films/thelanguage sekve aperis simila okminuta videoprogramo en la angla, al kiu baldaŭ aperis subtitoloj en diversaj lingvoj.

La filmetoj estas produktitaj dank' al François Randin, esperantisto el Lausanne, kiu venis kun la ideo kaj produktis la filmetojn. Jen la teksto en Esperanto, unu el la 22 elekteblaj subtitolaj lingvoj.



Saluton! Eble mi estas tro memfida, aŭdacante alparoli vin en la angla, lingvo, kiun mi ĉiam sentos fremda al mi. Sed mi ĝojas pri ĉi tiu okazo atesti pri miaj spertoj en la lingva kampo, kaj mi esperas, ke vi indulgemos, se mia maniero paroli la anglan ne atingas la nivelon, kiun vi atendas.

Mi laboris por internaciaj organizoj en la tuta mondo. Mi do scias, de interne, kiel komunikado funkcias, same en grandaj asembleoj kaj malgrandaj fakulgrupoj, kiel en ĉiutagaj kontaktoj kun la loĝantaro.

Mia aliro al la lingva defio eble estas nekutima per tio, ke mi parolas Esperanton ekde miaj adoleskaj jaroj. Esperanto estas internacia lingvo, kiu disvolviĝis surbaze de projekto lanĉita de juna viro en Pollando en 1887. Ĝi disvastiĝis tutmonde kaj estas nun homoj, kiuj uzas ĝin, en pli ol 120 landoj. Amaskomunikiloj, politikistoj, la plimulto el la lingvistoj kaj la „homo surstrata“ [=la

ordinaruloj] komplete ignoras ĝin, sed ĝi vivas, kaj estas ĉiutage uzata de parto de la tera loĝantaro.

Multaj imagas, ke la lingvan defion solvas la angla. Ne estas vere. Denaskaj parolantoj de la angla konsistigas nur 5 elcentojn el la monda loĝantaro, kaj nedenskuloj kapablaj uzi ĝin je bona nivelo nur pliajn 5 elcentojn. En la kontinenta Eŭropo, 90 elcentoj el la loĝantaro ne kapablas kompreni simplan specimenon de ĉiutaga angla lingvo.

Kiam mezuma polo kaj mezuma italo, koreo aŭ portugalo diskutas angle, ili aspektas kiel senlingvuloj, kiel t.n. afaziuloj, kvazaŭ ili suferis cerban difekton kaj la lingvocentro en ilia cerbo ne plu normale funkcias. Ili konstante traserĉas la menson por trovi bezonatan vorton, ilia prononco estas aĉa, ili gestas por kompensi la mankon de vortoj kaj ili bezonas kelkajn ripetojn por kompreni. Tre ofte ili rezignas,

ĉar la peno esprimi sin en lingvo malbone regata rabas de ili tro da energio.

Tamen ili studis la anglan dum ses aŭ sep jaroj, kun kvar aŭ kvin horoj ĉiusemajne. Instruo de la angla estas terura malŝparo. Kaj la kaŭzo estas, ne ke instrumentadoj aŭ instruistoj estas neadekvataj, nur ke la angla ne estas adaptita al la postuloj de interkultura komunikado.

Mi ĉeestis centojn da internaciaj kunsidoj uzantaj la anglan, centojn kun samtempa interpretado kaj centojn en Esperanto. La solaj vere viglaj, la solaj kun egala partopreno de ĉiuj, la solaj, en kiuj homoj vere estas spontanaj kaj sentas sin lingve hejme, komforte, estas la Esperantaj. La strukturo de la lingvo estas tia, ke la vortformo, kiu nature prezentiĝas al la menso, estas la ĝusta. Ses monatoj da Esperanto kondukas vin al komunikpovo, kiun vi ankoraŭ ne atingis post ses jaroj en aliaj lingvoj, inkluzive de la angla. Esperanto estas vere kost-efika, speciale se en koston vi inkluzivas penadon kaj tempon.

Mi parolis Esperanton kun lokaj loĝantoj en pli ol 50 landoj, de Japanio al Brazilo kaj de Nederlando al Uzbekio. Mi ĉiam trovis ĝin treege plaĉa. En Esperanto oni povas esti si mem. En la angla, nedenskaj parolantoj devas imiti fremdan modelon, sciante, ke ili neniam sukcesos perfekte. La miraklo pri Esperanto estas, ke vi povas grandparte konservi vian prononcmanon, vian manieron formi la frazojn, kaj tamen ĉiu komprenas ĉiun, kaj neniu iam ajn sentas sin ridinda, malsupera aŭ simple fremda. Ekzemple, por esprimi la ideon „Mi lernis ĝin vere rapide“, oni diros, laŭ la deveno: „Mi lernis ĝin vere rapide“ [franca akĉento], „Ho, vere rapide mi lernis ĝin“ [brita akĉento], „Mi ĝin lernis vere rapide“



[itala akĉento], aŭ „Ĝin vere rapide mi lernis“ [pola akĉento]. Jarcento da uzado pruvis, ke tiuj diferencoj tute ne ĝenas perfektan reciprokan komprenon.

Kiel iama UN-tradukisto, mi povas atesti, ke Esperanto estas bonega traduklingvo. Ĝi estas pli preciza ol la angla kaj do pli bone taŭgas por juraj kaj sciencaj tekstoj. Ĝi estas tre bone adaptita al humuro, kaj al poezio, kaj estas aparte taŭga por esprimi sentojn kaj emociojn, ĉar la formoj, kiuj spontane prezentiĝas en la menso, neniam devas esti inhibataj pro esceptoj, komplikaj gramatiko aŭ la manko de kohera derivsistemo. En Esperanto, se vi scias, kiel diri *luno*, vi ne devas lerni *luna*, vi formas la vorton mem. Simile *urbo* > *urba*, *jaro* > *jara*. Tiu eblo libere kombini nevariajn erojn, trajto kiun Esperanto kundividis kun la ĉina, havigas esprimriĉan kaj ampleksan vortprovizon sen trudi grandan penon al la memoro.

Ekde 1985, ne okazis tago sen uzo de Esperanto en internacia kongreso, konferenco aŭ alia renkontiĝo ie en la mondo. Ĝi estas tre uzata sur la Reto. Ekzistas Esperanto-versio de Google, kaj ankaŭ de Vikipedio.

Politika volo antaŭenigi ĝin kuracis la homaron el la afazio, kiu aperas ĉe la plimulto el ni, kiam ni devas interagi kun fremdlingvanoj.

Se la ŝtatoj decidus kunordige organizi Esperanto-instruadon en ĉiuj lernejoj de la mondo, kune kun rekomendo al plenkreskuloj dediĉi al ĝi dek minutojn ĉiutage dum tri monatoj – dek minutoj, tio estas malpli ol vi bezonas por solvi krucvorton aŭ sudokuon – tio ekfunkciigus „neĝbular“ procezon, kiu, post tempo, komplete ŝanĝus la lingvan panoramon de nia planedo. Ĉiu konservus sian gepatran lingvon, sed disponus praktikan rimedon por komuniki kun homoj el ie ajn. Estus pli da justeco por ĉiuj popoloj, pli bona reciproka kompreno ĉiukampe kaj tre pli bona uzo de la mono de la impostpagantoj. Ekonomiisto François Grin kalkulis, ke se Eŭropo alprenus Esperanton, tio estigus ŝparon de 25 miliardoj da eŭroj jare, t.e. ĉiujaran ŝparon de 35 miliardoj da usonaj dolaroj. Ĉu ne indus serioze konsideri ĉiujn ĉi faktojn kaj agadi surbaze de ili?

Mi dankas pri via atento.

Lastmomenta sciigo de la redaktoro: la filmo estas nun sur la ĉefpaĝo de Dotsub! Multaj homoj do povas vidi ĝin ĉe www.dotsub.com/!

Furoraĵoj de la Libroservo en Jokohamo

Libroj

ekz.	Titolo	Prezo €
88	<i>Internacia Kongresa Universitato 2007</i> (red. Amri Wandel)	8,00
75	<i>Vivo de Zamenhof</i> (Edmond Privat, red. Ulrich Lins)	7,50
74	<i>Historio por malfermi estontecon</i> (Kolektivo)	15,00
72	<i>Tyokusetuhou de manabu esuperanto nyuumo</i> (Stano Marček)	7,50
67	<i>Japanio kalejdoskope</i>	5,40
43	<i>Nova kurso de Esperanta interparolo</i> (Takeuti Yosikazu)	6,00
28	<i>Vojaĝo en Esperanto-lando</i> (Boris Kolker)	15,00
28	<i>Uliriamu-Oorudo-Sisyŭ</i> (William Auld)	12,35
27	<i>Esperanto per rekta metodo</i> (Stano Marček)	6,75
23	<i>Rusoj loĝas en Rusujo</i> (red. Anna Löwenstein)	9,00
22	<i>Vivoj tra la mondo</i> (red. Hori Jasuo)	6,05
22	<i>Japania-Esperanta vortaro</i> (Hirokazu Kaĵi)	5,40
21	<i>Esperanto tiel parolata</i> (Tacuo Huĝimoto)	6,00
20	<i>Nokto de la Galaksia Fervojo</i> (Miyazawa Kenzi)	6,00
20	<i>Invito al Internacia Lingvo Esperanto</i> (red. Hori Yasuo)	0,60
18	<i>Vikipedio – praktika manlibro</i> (red. Yves Nevelsteen)	3,00
15	<i>Esperanto-japana vortaro</i>	23,95
15	<i>Mil unuaj vortoj en Esperanto</i> (Heather Amery, Stephen Cartwright) ...	10,00
15	<i>Nova vortaro Esperanto-japana</i> (Joŝicugu Okamoto)	8,40
15	<i>Ekzercu vin en bazaj vortoj!</i> (Tani Hiroyuki)	7,20
15	<i>Bekkurso</i> (Dennis Edward Keefe)	6,50

Diskoj


26	<i>Esperanto elektronike</i> (DVD)	7,50
22	<i>Kantu kune!</i> (Asorti; KD)	15,00
15	<i>Internacia lingvo</i> (Daniel Haddad; KD)	10,50
14	<i>Bekumajoj 500</i> (Dennis Keefe; KD)	6,00

Dum la 92-a UK en Jokohamo la Libroservo de UEA vendis librojn k.a. varojn sume por 31 042 eŭroj. Supre estas listigitaj la plej furoraj libroj kaj diskoj. Ne estas listigitaj bildkartoj, glumarkoj, insignoj, skribiloj ktp, da kiuj vendiĝis centoj. La indikitaj prezoj estas tiuj aplikitaj dum la UK, en multaj kazoj forte rabatitaj.

Internacia Kongresa Universitato

Aperis reta IKU-Libro 2007. Atendataj prelegantoj por 2008.

Kvar monatojn post la elĉerpiĝo de cent paperaj ekzempleroj preparitaj por la Jokohama IKU, denove haveblas rete la libro de la 60-a IKU-sesio (9 prelegoj, 120 paĝoj, red. A. Wandel). Ĝi troviĝas en la IKU-paĝo de UEA (<http://uea.org/dokumentoj/IKU/>), kiu estis aldone ampleksigita per pluraj novaj informoj, kiel la nova IKU-komisiono, la IKU-regularo, raporto pri la IKU-sesio en Jokohamo kaj la invito de prelegoj por la venonta IKU en 2008 (vidu RE, novembro 2007). Proksimiĝas la limdato por la proponoj, kiuj devas ĝis la 30-a de januaro atingi la sekretarion de la IKU-



komisiono, prof. Amri Wandel (amri@huji.ac.il). Proponoj devas konsisti el koncizaj resumo kaj biografieto (sume ĝis unu paĝo), kaj povas esti konsiderataj ankaŭ por AIS/IKU-kurso (tri prelegoj). Estos bonvenaj proponoj rilataj al la kongresa temo „Lingvoj: trezoro de la homaro“ kaj rilataj al la cent-jariĝo de UEA.

La sukcesaj proponintoj ricevos, krom honorario, la honoron kontribui al la Roterdama kongresa programo (kaj IKU-libro), dividante sian konon kun dekoj aŭ eĉ centoj da kongresanoj kaj legantoj.

Amri Wandel

Eksterordinara superrigardo pri kultura fenomeno en nia kulturo

Moskvaj sonoriloj. Antologio de verkoj de moskvaj poetoj-esperantistoj. Div. aŭtoroj. REU/Impeto, 2007. 159p. 22cm. ISBN 9785716101395. Prezo: 15,00 €

En mia junaĝa periodo kiel esperantisto mi bonŝance akiris kelkajn jarkolektojn de la iamaj *Lingvo internacia* kaj *Juna esperantisto*. Dum mi legis tie poemojn de Deŝkin, Devjatnin, Jarmoleviĉ, Levenzon, ekevolvis ĉe mi la impresoj, ke rusaj Esperanto-poetoj estas iel diferencaj de la ceteraj poetoj sin okupantaj pri poezio en la internacia lingvo. La sincere emocia tono de iliaj poemoj tuŝis mian junan koron: amo, tristo, esperperdo, despero, simple kaj sendevie esprimitaj sentoj: *Mi volis ploreĝi, kaj vi – vi ekridis / ĉar amon vi mian ne sentis, ne vidis* – tiel Deŝkin en 1912. Tamen, aŭdiĝis voĉoj kritikaj pri tiatonaj temoj: en la komenco de la tridekaj jaroj Nekrasov, kunfondinto de IAREV (Internacia Asocio de Revoluciaj Esperanto-Verkistoj) kaj mem poeto, skribis (en *Enciklopedio de Esperanto*, 1933), ke la temaron de Deŝkin limigas „la nuraj motivoj pri amo kaj naturo” kaj ke tiaj temoj „ne multe harmonias kun la epoko”; kelkajn jarojn poste ambaŭ poetoj fariĝis viktimoj de tiuj revoluciaj fortoj, kiujn Nekrasov opiniis pli inda temaro de tiuepoka sovetia poeto ol la amo. Nekrasov estis pafmortigita, Deŝkin malliberigita kaj ekzilita dum multaj jaroj; la historio de multaj rusaj esperantistoj en tiu paranoja epoko estas pli peza ol povas larmoj esprimi.

Poste, dum mi legis la poemarojn de Miĥalski kaj Hohlov pluevolvis ĉe mi la menciita impresoj, ke la rusaj poetoj pli inklinas al sentoriĉaj esprimmanieroj ol al intelektaj abstraktaĵoj. Ĉu tio ŝuldiĝas al la kutime iom stereotipa opinio pri la sentema rusa popolanimo, mi ne scias, eble jes, eble ne. Kaj nun, legante la poemojn de *Moskvaj sonoriloj*, mi ne povas ne konstati ĉe mi revivigon de mia daŭre konservita impresoj de antaŭ jardekoj pri tiu esenca diferenco: ke emocia pulsado pli ol io alia karakterizas la vivon de tiuj poemoj.


La antologio enhavas poemojn de 36 reprezentantoj de la „Moskva skolo”, 25 viroj kaj 10 virinoj. La kompilinto, Nikolao Gudskov, en sia antaŭparolo konvinke pravigas

tiun nomon tiel, ke kompare kun aliaj esperantistaj centroj de Rusio, Moskvo estas historie la urbo de la Esperanto-poezio, kie elstaraj poetoj kiel Konstantin Gusev, Vladimir Samodaj kaj Bonifatio Tornado influ kontribuis al sentiĝo pri „skolo” meritanta apartan nomon. Ankaŭ la amtempa disfloro de originala kanta kulturo de junaj sovetiaj esperantistoj kaj plusekve la kultura aktivado de la moskva klubo Lev Tolstoj kaj poste de MLEK (Moskva Literatura Esperanto-Klubo) estis sendube gravaj faktoroj en tiu evoluo. Tamen restas provo difini la karakteron de la Moskva skolo de Esperanto-poetoj. Tian provon mi ne riskas fari definitive, kvankam la ĉi-koncerna antologio liveras konsiderindan

materialon por pripenso. Mi tamen emas aserti, ke multo komuna estas konstatebla ĉe la koncernaj poetoj, precipe la efikoj de malferma, aperta stilo, kiu garantias rektan kaj nebaritan konekton inter persona vivo kaj eksteraj cirkonstancoj kaj okazaĵoj, ordinaraj kaj neordinaraj. Tiun rektan, nebaritan, fluan konekton inter interno kaj ekstero mi volas emfazi, ĉar ĝi sentive kontribuas al senpretendo kaj sincero. En sia poemo *Poezio* Vladimir Samodaj demandas: Kio estas poezio? Ĉu fantazio, intelekta kaŝludo, klara penso, elokvento? Li ne scias la respondon, sed konstatas fine por si mem, simple kaj sincere: *Miaj versoj*

ne hipnotas / per bombaste pompa rim’ / Mi nur simplajn vortojn notas / kiujn diktas la anim’.

La libro estas dividita en kvar partojn laŭ kronologia ordo laŭeble proksima al la eniro de la prezentitaj poetoj en la Esperanto-kulturon. Detalaj informoj pri la poetoj konsistigas gravan parton de la libro. Frontas G. Deŝkin, N. Hohlov, N. Nekrasov kaj A. Logvin. Estas kortuŝe legi poemojn de Deŝkin, verkitajn en liaj lastaj jaroj post jardeko-longaj suferoj; lia poemo *Morna soneto* reeĥas versaĵojn de liaj fruaj jaroj, la amo vizitas lin denove: *Ekzisto sen revoj kaj sen kreoforto / vegeto sen amo, tenero, ador’... / Ah, nur iafoje pri Vi rememor’ / devigas bedaŭri pri manko de vorto*. Sekvas la spronantoj de la Moskva skolo: K. Gusev, B. Tornado (B. Tokarev) kaj V. Samodaj kaj pliaj poetoj sub la komuna dividtitolo „Profetoj”. Iliaj temoj grandparte estas tre personaj, sed tamen diferencaj: *Konfeso* de Gusev elvokas kunsenton kaj kuraĝigon al vjetnama amiko, *Prologo* de Tornado metaforan memhistorion, *Jaroj kuras*,



jaroj flugas de Samodaj realecan vivkronikon, ĉiuj grandaj poemoj kaj altmeritaj. Ĉe M. Bronŝtejn oni konstatas pli variajn temojn ol ĉe multaj aliaj, politikan satiron miksitajn kun grimaca humuro en *Mia prezidento* kaj *Gajaj frapistoj*, sed ankaŭ intimecajn, dubecajn memesplorojn: *Do mi ploras kaj amas / kun ĉagren', kun kares' / kaj fortuno ekrampas / de „apenaŭ” al „jes”*. V. Melnikov, M. Giŝpling kaj G. Arosev, tre rimarkindaj poetoj, trovas lokon kun pliaj poeziaj kolegoj sub la dividtitolo „Nova testamento”. La poemoj de Melnikov atestas kaj virtuozezan talenton kaj teman multflankecon, li filozofiumas en *Denove pri beleco* kaj *Saniga maro*, delikate sentesploras en *Post unu jaro*, bruske humuras en *Observoj de biletkontrolisto*. Giŝpling sombre meditas pri *Voĉoj el paseo*, „kio do estos poste” li demandas en du poemoj; lia poemo *Lumturo* atestas zorge ellaboritan uzon de simbolo, sed li verkas ankaŭ pri la lingvo kaj la rimoj: *Ĉe nia manko de rimeblaj vortoj / lasante for la manieron snoban / surmetu, Muzo, hejman lozan robon / kaj benu min per rimoj eĉ abortaj*. Arosev montras eltenan talenton en tema disvolvo en sia granda poemo *Ŝtoneto*.

Ne estas eble komenti en mallonga recenzo pri ĉiuj unuopaj poetoj en tiu ĉi atentinda antologio. Ke mi devis ellasi plej multajn ne signifas, ke mi ne taksas ilin valoraj por aparta pritrakto. Antaŭ ol meti finan punkton al mia transfluga supervido mi tamen volas mencii la lastan poemon en la volumo, la solan de N. Soljakova, titolitan *Al amiko*. Tion mi faras, ĉar ĝi bele reprezentas temon pli-malpli konstateblan ĉe preskaŭ ĉiu el la poetoj de la Moskva skolo, nome la amon: *Mi sopiras, mi tiel sopiras, amiko / pri la tagoj feliĉaj de la festival’* – deziro, sopiro, manko – la samaj sentoj, kiujn esprimas Deŝkin en la cititaj poemoj de 1912 kaj 1960. Iuj eble diras: tiaj la rusoj! Sed mi aldonas: Tiaj ni ĉiuj, almenaŭ iafoje.

Nikolao Gudskov faris bonegan laboron kompilante tiun ĉi rimarkindan antologion de verkoj de moskvaj poetoj-esperantistoj. Ĝi donas eksterordinaran super-rigardon pri certa kultura fenomeno en grava centro de vivanta Esperanto-kulturo. Aparte dankinda estas lia kolekto de daŭre valoraj biografioj de la verkistoj.

Baldur Ragnarsson.

Bardo revenis!

La Fiŝkaptisto. Vojaĝo tra la poezio de Fabrizio De André. Kantas Gianfranco Molle. Pisa: Edistudio, 2007. 40min. KD. ISBN 9788870360813. Prezo: € 15,00

Post multaj, multegaj jaroj fine revenis Ĝanfranko. Ĝanfranko Molle, kiu antaŭ tridek jaroj, kun sia kasedo *La vojo* malfermis la pordon al tuta generacio de kanzonistoj.

Kvankam en tiu ĉi disko *La Fiŝkaptisto* estas nur (fakte ne, sed poste!) kanzonoj de Fabrizio De André, la itala Brassens, ne eblas tuj ne rekoni kaj la stilon kaj la belan voĉon de la itala bardo. Ĉiujn kanzonojn brile tradukis Renato Corsetti. Kaj ĉi tie ne temas pri tekstoj de dek linioj ripetitaj dek-foje! Ne! Temas pri poeziaj tekstoj, ofte protestaj. Eble la muziko de Fabrizio De André iom postrestas la melodiojn de Brassens – foje...



Sed nepre aŭskultadu tiujn personojn. Jen la *fiŝkaptisto*, kiu partigas sian panon kaj vinon kun murdinto, kiun pelas la ĝendarmoj; jen *Manjo*, kiu glite falis en riveron kaj „*kiam la vento vidis ŝian belon, el la rivero portis ŝin sur stelon*.” Jen la *Mul-vojo en la maro*,

kie bedaŭrinde la muziko komplete superas la voĉon de l' kantisto... *Ŝpinu la lanon*, kiun Ĝanfranko registris en 1976, unu el la plej belaj kanzonoj de tiu ĉi disko – temas pri nostalgia elvokado de la korteza amo de iu poezia Mezepoko – ne estas de Fabrizio De André, sed de Robert Marcy, franca aŭtoro, komponisto, interpretisto, kiu verkis tiun kanzonon en 1949! *La stultulo* estas plena de humuro: „*por brili sufiĉas parkeri folion – mi provis la tutan enciklopedion...*” (kun voĉo, ve!, ankoraŭ tro malantaŭa!), *La Princino* ekstraktas temon ankoraŭ tabuan por multaj, tiun

de transseksemo, *Franca Majo* jam en *La Vojo* parolas per si mem... *La milito de Pjero* ankaŭ en *La Vojo* estas unu el la plej belaj kontraŭmilitaj kanzonoj, *Send Krik* kaj *Rimini* estis en la kasedo *Baf!* de 1984; Marĉela kunkantas *Rimini*, kaj oni povas nur plori, plori pro la malapero de tiu unika, varma voĉo en nia verdujo... La lasta kanzono *La flut-muzikisto* certe ne estas la plej trafa...

Iom strange tute ne aperas la nomoj kaj de Ĝanfranko kaj de Fabrizio De André sur la kovrilo... Tamen ja sur la disko!

Mi kompreneble atendas nun novan diskon de Ĝanfranko kun liaj propraj kanzonoj. Sed hodiaŭ ne maltrafu tiun ĉi juvelon, kiun ni ŝuldas al Renato, Fabrizio, Marĉela, bonegaj muzikistoj kaj Ĝanfranko la „Reaperanto”!

Ĵak Le Puil



Instrue, distre kaj edife

L'extraordinaire diversité des langues et sa répercussion sur l'espéranto. André Cherpillod. Courgenard: La Blanchetière, 2006. 103p. 21cm. ISBN 2906134708. Prezo: € 9,00

Balenoj, delfenoj kaj aliaj mirindaĵoj de l' oceano. Marie-Christine Body, André Cherpillod. Trad. A. Cherpillod. Courgenard: La Blanchetière, 2006. 58p. 21cm. ISBN 2906134694. Prezo: € 6,00

La verkoj de André Cherpillod estas bone konataj ĉe ni pro lia verva, malsnoba erudicio pri multaj temoj, inter ili ĉefe Esperanto kaj aliaj lingvoj sed ankaŭ iuj paranormaloj. La franclingva libro, kies titolo signifas „La eksterordinara lingva diverseco kaj ĝia manifestiĝo en Esperanto“, prezentas plurajn gramatikajn kategoriojn, sistemojn kaj fenomenojn (de la genro kaj nombro de vortoj ĝis la konjugacioj aŭ la vort-ordo) per amaso da ekzemploj el ĉiaj lingvoj de la mondo, kaj poste montras kiel fakte en Esperanto kaj kiel liaopinie Esperanton ĝenerale karakterizas la plej klaraj, simplaj kaj raciaj solvoj. Koncerne ĉi tion, foje Cherpillod nekonscie transiras de la derizinda objektiveco al siaj subjektivaj preferoj, ekzemple pri la literoj kaj la sonoj de Esperanto aŭ kiam li bedaŭras la neuzadon de „ci“, superregan jam de Zamenhof kaj eĉ de la *Unua Libro* kaj la *Fundamenta Gramatiko*. Verŝajne tia prezento de Esperanto, iom tro insista kaj reliefa, konvinkos neniun alian ol tiujn jam pli frue konvinkitajn, nome franclingvajn esperantulojn: kiel de amdeklaroj, ankaŭ de argumentoj tro fervoraj oni kutime fuĝas. Ĉiel ajn, ĉi verko entenas multajn interesajn informojn, jen i.a. pri surprizaj koincidoj inter la geografie foraj lingvoj ŝemidaj kaj keltaj, aŭ pri la same surpriza struktura simileco inter la verboj Esperantaj kaj ĉinaj.

La libreto pri balenoj, delfenoj kaj aliaj cetacoj, plene en Esperanto, same abunde kaj precize informas pri la vivado kaj ecoj de tiuj maraj mamuloj ofte amikaj kaj sufiĉe inteligentaj. Ne nur el la vidpunkto bestoscienca sed ankaŭ mita, historia kaj lingva (per la etimoj de iliaj

nomoj), kaj kun speciala atento al ilia „fato“, nome ke „post maksimume kelkaj jardekoj, pluraj specioj de cetacoj estos definitive forstrekita de la listo de la nun vivantaj specioj“. Ne pro natura malsano, sed pro la „senlima ĉasado“ fare de la homoj avidantaj ilian viandon (i.a. por nutrado de hundoj kaj katoj!), ostojn, dentojn, grason kaj aliajn substancojn. Plej ĉasemaj montriĝas Japanujo (kiun la geaŭtoroj atakas plej emfaze), Rusujo, Norvegujo, Islando, Hispanujo, Sudkoreujo, Tajvano, Brazilo, Ĉilio, Peruo... t.e. la kapitalisma mondo.

Oni permesu al mi atentigi pri kelkaj eraretoj facile forigeblaj en venonta reeldono (neniu sanktulo estas sen makulo): „aŭdorganoj“ (p. 11) iĝu „flar-organoj“; „karakteristiko“, „plastika“, „racio“ kaj la kobolda „et“ iĝu resp. „karakteriz(aj)o“, „plasta“, „porcio“, „kaj“; „Arktiko“, -a“ kaj „Antarktiko“, -a“ iĝu „Arktio“, -a“ kaj „Antarktio“, -a“ (cetere kaj malgraŭ PIV, oni prefere uzu ĉi du formojn nur por la polusaj regionoj kaj oceanoj, kaj rezervu por la antarkta kontinento la sufiksohavan „Antarktio, -ia“).


Mi dubas pri „drivo“ sur p. 23 (ĉu temas eble pri „direktilo“?) kaj probable anstataŭ „sonaro“ taŭgus „asdko“. Fine, konvenus ŝanĝi „polucio“ al „polu(ad)o“, ĉar eble ankaŭ balenoj kaj delfenoj, pri kies ripozado la libreto ne multon diras, senvole ellasas spermon dum la dormo.

La aŭtoroj kontribuas al nia originala fakliteraturo ankaŭ

per fakvortoj (belugo, butuo, mikrofaga, orcelo, platanisto, psikopompa, riteno, sotalio, teŭtofaga, tursiopso ktp), el kiuj almenaŭ la nomoj de cetacaj specioj povus eniri novan eldonon de PIV. Ĉi-rilate, tamen, mi ne komprenas lian uzon de „dronto“ anstataŭ „dido“, aŭ lian decidon ne proponi la nomon „pajĝio“ por la ĉina lagdelfeno. Parenteze, kaj pri la vivdaŭro de balenoj, mi ĵus legis en ĵurnalo ke, ĉi-jare, alaskaj inuitoj trovis en la kolo de agonianta 50-tuna baleno harpunon kun la dato 1880, kio signifas ke ĝi aĝis preskaŭ 130 jarojn.

„Balenoj...“ estas verko samtempe instrua, distra kaj edifa. Leginte ĝin mi eksciis, ke kaĉaloto grundinta sur plaĝo mortas neeviteble ne pro asfiksio, sed premita de sia propra pezo; aŭ ke cetacojn ne eblas anestezi, ĉar ili spiras vole, ne aŭtomate kiel homoj. Bele, se verkiĝus simila libro ekzemple pri primatoj.

Jorge Camacho



LA SUBAJN TITOLOJN MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bv. atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 19% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj (minime 4,00 eŭroj). Antaŭdankon pro via mendo! Gisdata katalogo de haveblaj varoj estas ĉe <http://www.uea.org/katalogo/>.

Almanako Lorenz 2007. Rio de Janeiro: SEA Lorenz, 2007. 120p. 21cm. ISBN 8586984205. Ilus. Mallongaj eseoj, prozaĵoj kaj poemoj. € 3,90

Blanko sur nigro. Rubén Gallego. El la rusa trad. K. Kniivilä. Novjorko: Mondial, 2007. 127p. 22cm. ISBN 9781595690722. Infano naskita kun handikapo estas kaŝita en diversaj infanejoj, en la lastaj jardekoj de Sovetunio. € 10,80

Diccionario Español-Esperanto Esperanto-Hispana. Miguel Gutiérrez Adúriz. Santander: mga, 2007. 450p. 17cm. ISBN 8492093153. La plej freŝa kaj ĝisdata Esperanta poŝvortaro por hispanlingvanoj. € 15,00

El la „Verda Biblio“. Izrael Lejzerowicz. Postparolo T. Chmielik. Czeladź: Hejme, 2007 (3-a eld.). 88p. 18cm. ISBN 9788392028949. Ilus. Klasika satirajo pri la verda lingvo kaj ties popolo. € 4,50

Esperanto por infanoj. Kajero tria. Svetozar Matev. Pleven: La aŭtoro. 60p. 21cm. La tria kajero en serio de komplete ilustritaj

broŝuroj por instrui bazan Esperanton al bulgarlingvaj infanoj. € 8,10

Esperanto u XXI stolitti: stan i perspektivi rozbitku. Do 100-riĉĉja knigi Mihajla Jurkiva „Pidručnik mijnarodnogo jazika Esperanto“. Div. Red. I. Galaĉuk kaj D. Buĉko. Ternopil': Pidručniki i posibniki, 2007. 96p. 20cm. ISBN 9789660708969. Plejparte ukrainlingva. Materialoj prezentitaj dum konferenco dediĉita al la centjariĝo de la unua E-lernolibro por ukrainoj (Ternopil', 29-30 junio, 2007). € 8,40

Esperantologio kaj la Interreto. Aktoj de la 29-a Esperantologia Konferenco en la 91-a Universala kongreso de Esperanto, Florenco 2006. M. Bavant, A. Künzli, M. La Torre, B. Wennergren. Red. Bertilo Wennergren. Rotterdam: UEA, 2007. 65p. 30cm. ISBN 9789290170990. Tekstoj de kvar prelegoj. € 9,00. Triona rabato ekde 3 ekz.


Fraŭlino Maitreyi. Mircea Eliade. Antaŭparoloj de P.

Dasgupta kaj C. Cubleŝan. El la rumana trad. I. Onet. Rotterdam: Bero, 2007. 200p. 21cm. Serio Oriento-Okcidento n-ro 43. Romano pri malpermesita amo inter juna eŭropano kaj eĉ pli juna bengalino. € 15,00

Hasegawa Teru. Sawada Kazuko k.a. Oosaka: Sesaragi-Syuppan, 2007. 334p. 19cm. ISBN 9784884161675. Ilus. Japanlingva. Kolekto de artikoloj pri la vivo, agado kaj idearo de „japana virino, kiu faris kontraŭjapanan disaŭdigon en la batalanta Ĉinio“. € 10,80

Ido, unu jarcenton poste. André Cherpillod. Courgenard: La Blanchetière, 2007. 47p. 21cm. ISBN 2902134740. Rigardo al Ido, historie kaj lingv(istik)e. € 5,10

Internacia Kongresa Universitato 2007. Jokohamo, Japanio, 4-11 aŭgusto 2007. Red. Amri Wandel. Rotterdam: UEA, 2007. 121p. 30cm. Prelegoj de A. Wandel, J.A. Vergara, Z. Sibayama, E. Macko, H. Gotoo, C.-Y. Lee, S. Yamasaki, E. Zhu, Ch. Kimura. € 12,00. Triona rabato ekde 3 ekz.





Kantoj de la veraj homoj. Gunnar Gällmo. Indigenaj Popoloj, 2006. 24p. 30cm. Kun 6 kd-oj. Pri la muziko de unu el la majaaj popoloj – la lakandonoj. € 22,50

Kio estas spiritismo? Allan Kardec. El la franca trad. L.C. Porto Carreiro Neto kaj I. Gomes Braga. Rio de Janeiro: Brazila Spiritisma Federacio, 2006 (2a eld.). 190p. 21cm. ISBN 8573284870. Enkonduko en la scion pri la nevidebla mondo per manifestiĝoj de la spirito. € 4,80

Kongresa libro de Universala Kongreso. Rotterdam: UEA, eldonata ĉiujare. 128p. 21cm. ISSN 00833851. Kun fotoj. Manlibro kun detala programo pri UK kaj adresaro de partoprenantoj. € 6,00

Kosmo sonoras per steloj. Vesmír zvoní hvězdami. Zdenka Bergrová. Ilustris Věroslav Bergr. El la ĉeĥa



J. Krolupper. Ŭstí nad Orlicí: Oŭtis, 2007. 83p. 19cm. ISBN 9788086845777. Du-lingva eldono (E, ĉeĥa). Mallongaj poemoj, parte liberformaj. € 5,10

Libro de la spiritoj, La. Enhavanta La Principojn de la Spiritisma Doktrino. Allan Kardec. El la franca trad. L.C. Porto Carreiro Neto. Brasíla: Brazila Spiritisma Federacio, 2007 (3-a eld.). 599p. 21cm. ISBN 9788573285116. € 9,60

Mallaborema formiko, La. William Luz. En Esperanton trad. M.A. da Silva. São Paulo: Elevação, 2007. 16p. 21cm. Kolorilus. „Libro per kiu oni lernas helpi la aliulon por konstrui pli feliĉan vivon. € 3,00

Memmortigo kaj ĝiaj konsekvencoj. Gerson Simões Monteiro. El la portugala trad. G. Ramos Costa. Rio-de-Ĵaneiro: SEA Lorenz, 2007. 79p. 21cm. Pri la memmortiginto en la spirita mondo kaj en la reenkarriĝo. € 3,60

Pidruĉnik mĵnarodnogo jazika Esperanto. Mihajlo Jurkiv. Lucjk: Helianto, 2007. 77p. 17cm. Represo de la unua lernolibro por ukrainlingvanoj (1907). € 5,10

Plej bela ruĝ-floro en la mondo, La. Savisa Mahvar. Ilustris Jaser B. Rad. El la persa trad. S. Abbasi. Tehrano: Irana Esperantisto, 2007. 44p. 12cm. Bind. kun kromkovrilo. Ĉarma bildstrio, en la stilo de Shel Silverstein, pri la vivo de floro. € 12,00

Purakore. Attila József. El la hungara trad. I. Szabó. Zalaegerszeg: Humana Eŭropo-Asocio, 2006. 128p. 21cm. ISBN 9789638750006. Pli ol cent poemoj de elstara personeco de la hungara literaturo. € 9,90

Ruĝa fiŝeto. William Luz. En Esperanton trad. M.A. da Silva. São Paulo: Bolo com Pudim, 2007. 16p. 21cm. Ilustrita rakonto adaptita el egipta legendo. € 3,00

Sendependaj homoj. Halldór

Laxness. El la islanda trad. B. Ragnarsson. Novjorko: Mondial, 2007. 478p. 22cm. ISBN 9781595690562. Romano pri la kredoj kaj vivoj de islandaj kamparanoj en la unua duono de la 20a jarcento. € 24,00

Sprachenpolitik und Sprachkultur. Red. Detlev Blanke kaj Jürgen Scharnhorst. Frankfurt am Main: Peter Lang, 2007. 280p. 21cm. ISBN 9783631555927. Tekstoj de 11 germanlingvaj prelegoj traktantaj diversajn lingvistikajn temojn. € 61,50

Toldi. Epika poemo. János Arany. El la hungara trad. M. Fejes. Novjorko: Mondial, 2007 (2-a eld.). 84p. 22cm. ISBN 9781595690739. Poemo inspirita de la legenda Miklós Toldi, servisto al la hungara reĝo Lajos I. € 9,90

Woordvolgorde in het Esperanto. Normen, taalgebruik en universalie. Wim Jansen. Utrecht: LOT, 2007. 282p. 24cm. ISBN

9789078328360. En la nederlanda, kun resumoj en la germana, angla kaj E-o. Doktoriga disertacio pri la vortordo en Esperanto. € 34,50

DISKOJ

Internacia lingvo. Daniel Haddad. Curitiba: La aŭtoro. Kun tekstfolio; 42 min. Dekduo da kantoj kun tekstoj mesaĝplenaj kaj kun agrabla instrumenta akompano. KD. € 10,50

Israelo 5733 / Malto. Roman Dobrzyński. Varsovio: La aŭtoro, 1992. 27+30min. Filmo pri Israelo, ĝiaj historio kaj ĉiutaga vivo en la jaro 1992, plus filmimpresoj pri la mediteranea insulo de la Suno kaj historio. DVD. € 12,00

Memmortigo kaj ĝiaj konsekvencoj. Gerson Simões Monteiro. Voĉlegis Paulo Sérgio Viana. El la portugala trad. G. Ramos Costa. 2 diskoj. Voĉlegita versio de la samtitola libro (vidu ĉi-supre). KD. € 6,00

OSIEK-PREMIO 2007
En 2007 la Osiek-anoj proponis 20 verkojn premiindajn; ĉiuj estis prezentitaj en la juna numero de La Gazeto. La 20an de julio 2007, dum la IEK en Pazarĵik, Bulgario, sekreta voĉdonado atribuis la premion al

Armela LEQUINT & Jak LE PUIL



pro la esperantigo, el la franca, de romano de CÉLINE (*Voyage au bout de la nuit*)

'Vojaĝo ĝis noktofino'
Gratulon!

La premio, 600 €, rekompensas vivantan aŭtoron pro publikigita verko ne fikcia aŭ pro grava traduklaboro

Informoj
La Gazeto, 12 sous la Ville, FR-93210 Créteil <http://osiek.org>

Oficiala informilo



DUMVIVAJ MEMBROJ

Hispanio: C. E. Carleos Artime.

SOCIETO ZAMENHOF

Norvegio: D. Draper.

DONACOJ

Ĝis la 1-a de novembro 2007

Konto Afriko: Nederlando: C. & R. Bossong 25,00. Svedio: J. Hammarberg 10,77. *Sumo ĉi-jara: 1 697,64.*
Eraranonco: en la du lastaj Ol estis monataj sumoj, ne-aldonitaj al ĉi-jaraj donacoj.

Fondaĵo Ameriko: Svedio: J. Hammarberg 10,77. *Sumo ĉi-jara: 1 733,50.*

Fondaĵo Azio:

Japanio: M. Nakatu, H. Takahasi, Y. Ueno – po 24,52; T. Huzita 18,39; Y. Itou, Y. Mizuno – po 30,65; Y. Aida, T. Yamada – po 12,25; H. Gotou 36,78. *Sumo ĉi-jara: 1 408,49.*

Fondaĵo Canuto: Francio: L. Marin 60,00. Nederlando: R. Moerbeek 50,00. Usono: Ĵ. Amis 70,92. *Sumo ĉi-jara: 5 454,48.*

Ĝenerala kaso: Francio: H. Roy 70,11. Hispanio: C. E. Carleos Artime 54,05. Usono: J. T. Williams 70,42. *Sumo ĉi-jara: 3 836,37.*

Al ĉiuj koran dankon! UEA

La morto kaj la morto de Marvin Stanley

Legi nekrologon de kara kolego ĉiam estas ŝoke, eĉ sciante jam pri lia forpaso. Aparte onin kaptas ia sento de malrezigno ĉe la konstato ke Marvin Stanley (okt., p. 214) vivis kruele mallongajn 53 jarojn – dum meza esperantisto atingas, se sterile statistiki laŭ la mortrubriko de ĉi tiu revuo, almenaŭ okdek vivojarojn. (Sed ne Akiko Nagata, 1936 -1990; ne Neil Salvesen; 1944-1990; ne Izabel Santiago, 1959-2006...).

Kiam mi mem verkadis, redaktore, vivpriskribojn de niaj mortintoj, ofte mi haltis por pripensi, preter la ĉioma maljusteco de ĉies nia provizoro, kiel ridinde relativas ĉi tiuj resumoj: „forpasis... esperantistiĝis... aktivis... prezidis... eldonis... fakdelegito... multjara... Societo Zamenhof... Honora Membro...”

Pri iuj el ni, la arkivoj riĉas je donitaĵoj; pri aliaj el ni, malpli – sed ĉu tiaj diferencoj vere indikas ion pri la efektiva enhavo de niaj vivoj? Kelkaj amasigas

verdajn titolojn kaj rangojn, akumulas modestajn moŝtecojn (redaktore respireblajn, nekrologe retroveblajn) laŭlonge de sia movada vivo, dum aliaj pacience, persiste plenumadas eble nur unu aferon, konstante, kohere kaj kompetente – tiel ke ilia vivo povas efiki malpli bunte, simple resumeble, dum ili alportas pli gravan brikon al nia konstrua, komuna entrepreno.

Ĉi tia konstrua homo estis ĉefkontisto Marvin Stanley. Mense mi revidas lin labori en la ciferplena ĉambro Monte-Carlo; forigi, kun rastilo en la mano, falfoliojn de la oficeja tegmento; formeti sian poŝplenan laborveŝton en nia komuna hotelĉambro Adelajda; mi vidas lin en la Roterdama metroo, kie nian diskuton (li ne kaŝis kaj ne trudis siajn opiniojn) interrompis subita haltejo... Jes, Marvin estis aktivulo de Espermenso, jes, ĝardenemulo – sed precipe homo kies ĉeesto, kies esto plej konkretis por tiuj centoj kaj centoj da kongresanoj, por tiuj miloj da verdaj klientoj kiujn li priservis kun barba rideto, neniam laŭtigante la voĉon, en profunda pacienco.

Ne facilas bildigi al si idealismon kiu sin esprimas ne tra entuziasmoj kaj manifestoj, sed tra ĉiutaga, ofte tage dekdu-hora, diligento kaj ĝisfundemo, profesie solida servado al la afero.

Malaperis la Marvinata evidento.

István Ertl



Al diverskultura komunumo

Semajfine 13-14 okt 2007 okazis la 39-a Korea Kongreso de Esperanto en Hankuk-Universitato de Fremdaj Studoj, Seulo. Aliĝis 163 personoj inkluzive de 11 eksterlandanoj el Francio, Svedio, Aŭstralio, Japanio kaj Ĉinio. La kongresa temo estis *La vojo al diverskultura komunumo*.

Dum la kongresa programo okazis fakaj kunsidoj: partoprenantoj en Hindia Azia-Kongreso, interesatoj pri Esperanto-literaturo, la anoj de Espera Monto, katolikoj, kristanoj kaj ŭonbulismoj.

La programo de kongresa universitato konsistis el du prelegoj: la unuan faris d-ro Kawanishi Tetsuro el Japanio, pri la temo *La lastaj jaroj de Zamenhof*. La duan prelegon faris d-ro Lee Chong-Yeong pri la libro *Historio por Malfermi Estontecon*, pri la valoro de komuna historia lernolibro inter Ĉinio, Japanio kaj Koreio, kiu estis eldonita en la komuna lingvo en julio.



Kadre de la kongreso okazis simpozio pri la kongresa temo, en kiu prelegis s-ro An Ĝong Su (eksa ĝenerala sekretario de KEA) pri *Politiko en Koreio por enmigrintaj nekoreaj laboristoj*, profesoro Sandor Horvath el Aŭstralio pri *Ĉu Koreio estas stranga?* kaj profesorino Birke Dockhorn el Germanio pri *Vivo de fremdulo en Koreio*. Oni konkludis, ke ankoraŭ ne largas la vojo al diverskultura komunumo en Koreio.

Dum la kongreso KEA-deputitaro elektis d-ro Park Wha-Chong kiel novan prezidanton de KEA. Li estas esperantisto de la jaro 1977 kaj estas estro de la Kliniko Espero en la urbo Pohang.

La 39-an KKE oni rerigardas kiel tre sukcesan kongreson, precipe pro la infana kurso, en kiu 22 geknaboj lernis Esperanton ludante kaj kantante per la lingvo sub la gvido de s-ino Bak Suhyeon.

Kim Uson

„Diplomitaj esperantistoj” en Brazilo



La 26-an junio 2007 13 novaj gelernantoj fariĝis „diplomitaj esperantistoj”.

La kurso okazis en la lernejo Moacyr Padilha en la brazila urbo nomata Três Rios (Tri Riveroj). La bazan kurson, kiu daŭris dum tri monatoj, gvidis la estrarano de Tri-rivera Esperanto-klubo Jorge Linck da Silva. La kursanoj sekve transiris al daŭriga kurso, ĝis decembro 2007. Kelkaj kursanoj havas retadresojn, se vi volus gratuli ilin: diego_bnh11@hotmail.com; lmaia-ada@yahoo.com.br; vanydiana@hotmail.com; aleixotresrios@hotmail.com; ruanita_help@hotmail.com.

Ĉinaj komercistoj kaj entreprenistoj

De la 15-a ĝis la 17-a de septembro 2007 okazis en la ĉina havenurbo Rizhao sukcesa jarkunveno „IKEF-Ĉinio 2007“. Partoprenis en ĝi 34 personoj, plejparte komercistoj kaj entreprenistoj el ĉina Esperantujo, krome du uzbekaj kaj unu brazila esperantistoj.



En Ĉina Esperantujo ekzistas centoj da komercistoj kaj entreprenistoj, kiuj parolas nian lingvon, kaj volas uzi ĝin por sia laboro. La septembra kunveno konsciigis ilin pri la „flugiloj“, kiujn donas al ili Esperanto kaj tial ili decidis organizi plian kunvenon en 2008.

La organizantoj de la venonta „IKEF-Ĉinio 2008“ intencas partoprenigi pli multajn eksterlandajn komercistojn kaj entreprenistojn, parolantajn nian lingvon, resp. ne-esperantistojn, akompanatajn de interpretistoj.

Interesiĝantoj bonvolu kontakti s-ron Ĉielismo Wang Tianyi, ĉina peranto de IKEF: komerco@public.xa.sn.cn, aŭ chielismo@yahoo.com.cn.

„Semajno“ en Katalunio

La 15-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo okazis 29 sep - 06 okt 2007 en Tossa de Mar Girona, Katalunio, Hispanio.

La ĉi-jara „Semajno“ atingis novan rekordon: aliĝis 131 esperantistoj el diversaj landoj de Eŭropo, Japanio kaj Meksiko. La sabatan Interkonan Vesperon sekvis la dimanĉa Inaŭguro, kun ĉeesto de la skabeno pri Turismo kaj Kulturo s-ro Josep Colomer. Post ĝi okazis la tradicia komuna fotografado.

Nia delegacio estis akceptita de la urbestro Imma Colom i Canal. En urbodoma vitrino estis deponita memortabulo pri la evento.

Okazis tri ekskursoj: unu duontaga, perŝipa, al bela klifa marbordo kaj ties grotoj, kaj tuttaga ekskurso al „Kastell Sant Ferràn“, malnova fortreso, konstruita en epoko de militaj konfliktoj inter Hispanio kaj Francio, kaj al „Aiguamolls“ (Humidaĵoj), haltejo por la migrantaj birdoj irantaj al Afriko. En ties aŭditorio prelegis la belgino Ives Eeckhout, helpate de bildoj, pri diversaj kutimoj de birdoj. La prelegon *Eŭropo en perspektivo* faris Antoni Marco Botella. Ĝi transiris al debato pri la naskiĝanta Eŭropo. Árpád Máthé el Hungario informis pri la laboro de „Rondo Takács“ sur la kampo de bibliografio. En tiu projekto kunlaboras ankaŭ Hispana Esperanto-Muzeo kaj

„Biblioteko Molera“, ambaŭ el Katalunio. Prelegis ankaŭ Wolfgang Guenter pri komunikada ekologio: *Esperanto – sinoptiko de ĝiaj porvivaj rekoniloj*.

Kiel kutime okazis du interkonaj vesperoj, kie ne mankis ĉampano Esperanto, refreŝigaj trinkaĵoj kaj frandaĵoj. Apartan mencion meritas la folkloro vespero, kie la ensemblo „Grupo Habaneras Montjuïc“, per siaj kubaj kanzanoj (iuj en Esperanto) amuzis la ĉeestantaron. Kaj al tio aldonu la faman „cremat“, la tipan trinkaĵon de Katalunio.

Kurson de Esperanto gvidis nia hispana akademiano Miguel Gutiérrez Aduriz, kun granda ĉeesto. Per la „Premio Ada Sikorska Fighiera“ estis premiita la hispana s-ano Antonio Marco Botella.

Pro la fakto, ke ĉi-jare estis elektita nova Estraro de UEA, okazis „Radiografio al UEA“. La debato baziĝis sur jenaj demandoj: *Ĉu UEA estas necesa por la disvolviĝo de la E-movado? Ĉu UEA devas esti neŭtrala? Ĉu vi konsideras taŭga la elektadon de la UEA-gvidantoj? Ĉu vi aprobas la nunan funkciadon de UEA? Kiam la informadiko estos plene uzata, ĉu tio favoros al UEA? Ĉu ĉiu esperantisto devus esti membro de UEA?*

Oni povas konkludi el la diskutoj, ke la ekzistado de UEA estas tute necesa, kvankam devus ŝanĝi kelkaj aspektoj de la nuna UEA. **Luis Serrano Pérez**




Margaret L. Barkley (1921-2007) forpasis la 24-an de aŭgusto en San-Francisko (Usono). Dumviva membro de UEA, ŝi estis delegito en San-Francisko ekde 1970 kaj vicdelegito ekde 1997. Ŝi subtenis multajn Esperanto-agadojn kaj regule membris en Societo Zamenhof.

Zdzisław Błajejczyk (1941-2006) mortis la 12-an de decembro. Prestiĝa fotografo, li partoprenis pli ol 250 ekspoziciojn en 36 landoj kaj liaj verkoj troviĝas en la Novjorka Muzeo de Moderna Arto. En la 1960-aj jaroj li aktivis en Pola E-Junularo. Li lekciis pri fotoarto en la Studumo pri Kulturo kaj Turismiko en Bydgoszcz kaj estis membro de AIS.

Robert Durand (1922-2007), konsilanto pri daŭra edukado, forpasis la 3-an de novembro en Epinal (Francio), kie li estis delegito kaj fakdelegito pri geografio.

Zlata Flego (1922-2007), emerita ĵurnalistino, fratino de Srđan Flego, forpasis la 15-an de septembro en Zagrebo. Ŝi estis respondeca redaktoro de *La Suda Stelo* 1948-1950 kaj aperigis E-kurson en la porvirina revuo *Žena* 1963-1964.

Manfred Gränitz (1932-2007) mortis la 6-an de novembro en Chemnitz (Germanio). Li aktivis en la loka grupo kaj kunorganizis dufoje la saksan E-renkontiĝon JAZAF en sia urbo, tiam nomata Karl-Marx-Stadt.



Georges Larglantier (1920-2007) mortis la 15-an de oktobro en Parizo. Li redaktis la tabelon de E-radioelsendoj por tiu ĉi revuo ekde ties januara numero 1950 ĝis la decembra numero 1991. Kiam li forlasis la taskon, la revuo notis, ke „neniu ĝis nun tenis tiom longe – 42 jarojn – difinitan postenon ĉe UEA”.

Giuseppe Martini (1924-2007), delegito en Pizo, forpasis en Asciano Pisano (Italio). Li estis prezidanto de la E-klubo de Pizo ekde 1970 kaj membro de la Nacia Konsilio de Itala E-Federacio 1973-2000. Dum multaj jaroj li instruis Esperanton al universitataj studentoj kaj al plenaĝuloj en la Universitato por plenaĝuloj, kiun li kunfondis.

Lajos Szekeres (Ljudevit Sekereš, 1927-2007) mortis la 22-an de oktobro en Senta (Serbio). Fervoja inĝeniero, li aktivis en Jugoslavia Asocio de Fervojistaj Esperantistoj, i.a. kiel prezidanto, sed lia plej grava agadkampo estis terminologio. Li kunverkis *Fervoja terminareto Eo-serbokroata/serbokroata-Eo* (1971) kaj de 1973 li estis membro de la Terminara Komisiono de IFEF.



Richard E. Wood (1940-2007), dumviva membro de UEA, forpasis la 25-an de septembro en Keaau (Havajo, Usono). Laŭnaske brito, li estis ano de Kembriga E-Klubo en la fruaj 1960-aj jaroj. Li poste doktoriĝis en Usono kaj fariĝis profesoro pri lingvistiko, ĝis en la 1980-aj jaroj li retiriĝis al Havajo, kie li fondis vendejon de fruktoj kaj kafo. La kontribuo de Wood al la starigo de interlingvistiko kaj esperantologio kiel akceptataj studoterenoj en universitataj medioj estis tre signifa, i.a. pro lia alta reputacio en la lingvistika mondo. Li estis redaktoro de *La Monda Lingvo-Problemo* 1973-1976 kaj de ĝia daŭriganto *Language Problems and Language Planning* 1977-1984. Wood aŭtoris la E-dokumenton *Current work in the linguistics of Esperanto* (1982) kaj multe artikolis en fakaj revuoj pri Esperanto kaj rilataj temoj. Li havis eksterordinaran kapablon kvazaŭ ensorbi lingvojn, ĉefe per DX-aŭskultado, lia granda ŝatokupo. Li komprenis centon da lingvoj kaj flue parolis ĉ. 12. Lia gvidlibro pri DX-aŭskultado, *Shortwave voices of the world* (1969), estas vaste konata.

Anoncetoj



Unu vorto = 1 internacia respondkupono (€ 0,89).
Ni ne respondecas pri la enhavo. Ripeto ne rajtigas rabaton.
Pri korespondpetoj zorgas ankaŭ Koresponda Servo Mondskala, B.P.6, FR-55000 Longeville-en-Barrois, Francio,
www.multimania.com/kosomo.

500 div. Esperanto-stampoj, Esperanto-pm. Ofertolisto kontraŭ neuzitaj pm je la valoro de 1 EUR. Interŝanĝo de pm: mi donas Germanion kaj Iranon**. Neussner, DE-37284 Waldkappel, Germanio.

D kaj FD en Oldenburg, Germanio, Uwe Joachim Moritz atentigas pri eraro en Jarlibro 2007, p.166. Liaj telefonnumeroj estas +49 4482 97225 kaj +49 4482 974484, kaj la n-ro de la telekopiilo +49 4482 974485.

Korektoj: la redaktoro petas forstreki la revuon *Pola Esperantisto*, kiu ĉesis aperi, el Abontarifoj 2008 (revuo *Esperanto*, nov 2007, p. 229). Anstataŭas ĝin Fonto, kiu reaperos ekde 2008. Prezo: € 30,00. La disertacio de Wim Jansen (p. 235, samnumere) estas aĉetebla ankaŭ ĉe la Libroservo de UEA (vidu la paĝon 256 ĉi-numere).

Abontarifoj 229
Administrado 139
Afriko 19, 69, 134,
139, 249
Ago-Semajno 34
Ahmed, S.A. 69
AIS 105, 225
Akademio, ADE 202
AKEL 165
Alois i Font, H. 45
Ameriko 134, 204
Amery, H. 40
Amikoj de Esperanto
133
Anoncetoj 18, 46, 70,
166, 205, 229, 260
Antoŝ, O. 70
Arabaj landoj 135
Asorti 188
Assefa, M. 123
Astrofiziko 21
Asturio 223
Atkinson, W.G. 94
Auderskaja, T. 108
Aŭstrio 42
Azari, A. 238
Azia Agado 105, 135

Babiarz, K. 142
Baláz, P. 164, 196, 212
Balbin, J. 142
Balech, E. 214
Balkanaj landoj 136
Ballard, B.C. 22
Barbosa, E.R. 214
Barkley, M.L. 260
Baudelaire, C. 112
Becker, U. 62
Belartaj Konkursoj
182, 229
Beletra Almanako
84, 102
Beleva, B. 106
Belgio 150
Beloŝević, M. 82
Benino 134
Bergman, L. 70
Bibliotekoj 130, 151
Bijleveld, M. 94
Billy, H. 22
Bishop, J. 181
Bjalistoko 181, 198,
226
Blanke, D. 9, 39
Błażejczyk, Z. 260
Bobrzak, I. 34

Body, M.-C. 254
Boersma-Hoekema,
H. 214
Bona Espero 104
Borsboom, E. 86, 232
Bratislavo 8
Brazilo 44, 104, 135,
141, 150, 212, 258
Britio 50,
Broadribb, D. 159
Bronŝtejn, M. 208
Browne, P. 41, 87,
Bulgario 165
Buller, O. 61, 109,
148, 176, 185, 187,
224, 226
Bute, A. 93, 236
Bydgoszcz 117

Camacho, J. 15,
16, 41, 62, 87, 102,
107, 254
Caragea, N. 40
Carruba, Z. 101, 214
Cartwright, S. 40
Casp P.M. 107
Casquero, A. 117,
152, 210, 235
Castell, E. 70
Centra Oficejo 11,
109, 138, 139, 148
Chaisnot, H. 214
Cherpillod, A. 19, 254
Chmielik, T. 82
Cibulevskij, D. 210
Clerici, R. 8, 177, 219
Corsetti, R. 3, 56,
147, 172
Costa, F.D. 238
Csizsár, A. 86

Ĉehio 9, 66, 69,
Ĉinio 19, 21, 114, 150,
152, 210, 235, 259
Ĉupin, B. 68

Dahlenburg, T.-D.
87
Dasgupta, P. 102, 177,
184, 195, 223, 243
De André, F. 253
Derks, J. 83
Devillez, M. 94
Dijk, Z. van 86
Dobrzyński, R. 198,

246
Dočekal, M. 164
Dodd A. 52
Dorcas, F. 114
Döring, E. 238
Dragsted, S. 168
Dua Vivo 220
Dudich, E. 183
Durand, R. 260

E@I 128
Eahsan, J. 151
edukado.net 10, 180
EEU 6, 8, 35, 136, 196
Eksteraj rilatoj 132
Ekumenismo 211
Ekzamenoj 42, 128,
181
Enketo 12, 101
Eroŝenko, V. 150
Ertl, I. 83, 102, 257
ESF 10
Esperantologio 90
Esploro kaj
dokumentado 130
Estraro de UEA 109,
126, 138, 176
Eŭropa Forumo 35
Eŭropa Unio 8
Eŭropo 136, 149, 211
EVA, la angulo de 16,
40, 62, 88, 112
Evans, E.G. 40, 64,
159

Faka agado 9, 129
Familioj 130
Ferreira, R.M. 107
Ferrer i Manyá, J. 70
Fervojistoj, IFEF 93
Festivaloj 32, 33
Fiedler, S. 39
Filmoj 151
Finkenzeller, M. 142
Flego, Z. 260
Fontes, E. 214
Forpasoj 22, 70, 94,
142, 166, 214, 238,
260
Francio 20, 149, 204,
210

Genovaité, L. 165
Gergely, M. 214
Germanio 32, 90, 247

Gilbert, W. 70
Goes, H. 148
Gončarova, I.G. 158
Gorecka, H. 42
Grabarević, B. 214
Grabowski, A. 163
Gränitz, M. 260
Grattapaglia, G. 171
Grattapaglia, U. 104,
171
Grigorjev, V.P. 94
Grosser, I. 22
Gubbins, P. 51, 53,
159, 203, 231
Gudskov, N.L. 158
Guevara, N.D. 213
Gutiérrez-
González, M. 150,
204

Ĝemelaj urboj 4,
5, 133

Hackett, D. 70
Hanojo 237
Harlow, D. 183
Harmon, L. 103
Havel, V. 196
Hayasi, K. 22
Helfrich, F. 22
Hernandez, A. 173
Herzberg 1, 2, 4, 73,
183, 247
Hindio 44
Hirose, Y. 70
Hispanio 223
Homaj rajtoj 133, 223
Honoraj membroj
139, 183
Hori, J. 16
Huĝimoto, T. 107
Hungario 42

Indiĝenaj Dialogoj
77
Infanoj, IIK 193, 197
Informado 127, 134
Instruado, ILEI 51,
56, 68, 127, 128,
134, 181, 165, 224,
225, 236, 249
Interlingvistiko 93,
224
Internacia Kongresa
Universitato 105,

156, 205, 226, 251
Intervjuo 4, 10, 28,
102, 198,
Israelo 42, 45, 66,
114, 235
Italio 101

Jad Vaŝem 78
Jansen, W. 125, 235
Japanio 28, 84, 169-
190, 206, 236, 251
Jarlibro 138, 163
Jegorovas, P. 42, 114,
151
Jerusalemo 92
Johansson, S. 110,
Jokohamo 28, 37, 54,
66, 90, 251
Jong-Beukers, R. 214
Jordan, V. 208
Junularo, TEJO, IJK
25, 26, 138, 195,
200, 217, 237, 246

Kalendaro 57, 153,
227
Kalifornio 43
Kalocsay, K. 112
Kanado 204
Kapista, T. 203
Karczewska, E. 226
Karlović, T. 214
Katalunio 45, 117,
259
Kereszthegy, T. 22
Kimura G. 173
Klag, W. 42
Kleriga Tago 132, 105
Kocevski, S. 142
Koga, S. 142
Kolker, B. 61, 181, 202
Komerco 259
Komitato de UEA 82,
137, 176
Komlósi, A. 238
Kompaktdiskoj/DVD:
Aŭdo-vida
konversacia kurso
de Esperanto por
progresintoj 63
Civilizacio. Strikta
tango 15
Esperanta voĉo 208
Esperanto elektronike
159
Fiŝkaptisto, La 253

*Instruaj bildoj
por rektmetoda
instruado* 63
JoMo friponas 111
Meven 160
*Ondumoj tra la
mond'* 160
Konferencoj 9
Kongresa Komuniko
37, 79, 248
Kongresa temo 54,
132, 174
Kongresoj 28, 45, 67,
69, 131, 150, 169-
190, 220, 248
Konisi G. 183
Konkurso 185
Kontakto 95, 119,
138, 143
Koreio 14, 97, 116,
164, 241, 258
Koresponda Servo
Mondskala 95, 239
Korjenkov, A. 232
Kóródy, Zs. 5
Kosiarska, G. 180,
222
Kostariko 210
Kotiztabelo UEA 46,
205
Koutny, I. 93, 224
Kovács, S. 94
Kováts, K. 10, 63, 158,
181, 190
Kroatio 42, 66, 114,
118
Krucenigmo 22
Kubo 151, 213
Kulturo 130
Künzli, A. 39, 207,
230
Kurusu K. 172
Kursoj 43, 51, 67, 68,
97, 98, 116, 210, 212
Kverko, P. 212

Landa agado 133
Landmark, M. 22
Lapenna, I. 24, 191
Larglantier, G. 260
Laste Aperis 17, 65,
89, 113, 140, 161,
209, 233, 255
Le Pui, J. 253
Ledon, C. 172

- Lee Jung-kee 116
 Lernejo 165, 190
 LeQuint, A. 16
 Leterkesto 107
 Libroj 23, 47, 72, 96,
 119, 120, 143, 144,
 167, 168, 181, 191,
 192, 215, 216, 239,
 251, 264, 265
 500 samyh vajnyh
 slov jazyka
 esperanto 158
 Balenoj, delfenoj kaj
 aliaj mirindaĵoj de
 l' oceano 254
 Celakantoj. Poemoj
 41
 Elementarnaja
 grammatika jazyka
 esperanto 158
 Esperanto priamou
 metódou 63
 Esperanto per rekta
 metodo 63
 Extraordinaire
 diversité des
 langues..., L' 254
 Historio de Esperanto
 232
 Infantravivaĵoj.
 Aŭtobiografia
 rakonto 16
 Instruaj bildoj
 por rektmetoda
 instruado 63
 Interlinguistische
 Beiträge.
 Zum Wesen
 und Funktion
 internationaler
 Plansprechen 39
 Jazyk Esperanto
 za odin mesjac.
 Samoučitel'
 razgovornogo
 jazyka 158
 Kantoj de Anteo 38
 Ksenofobia gvidlibro
 al la italoj 160
 Lupino kaj aliaj
 rakontoj de Saki,
 La 159
 Mil unuaj vortoj en
 Esperanto 40, 64
 Moskvaj sonoriloj 252
 Neutrale Sprache,
 Die 230
 Ni ne estas senpovaj/
 Nie sme bezmocní
 14
 Novjorkaj poemoj 62
 Plena Manlibro
 de Esperanta
- Gramatiko 111*
Pli lume la mallumo
zumas... Stilfiguroj
en la poezio de
esperanto 87
Raportoj el Japanio
8 16
Rubriko Esperanto
de la tagĵurnalo
„Dong-a ilbo“ 231
Saturno. Poemas
bilingües /
dulingvaj poemoj 41
Strana Esperantija
– Karmanaja
enciklopedija 158
Universalaĵ lingvoj en
Svislando 207
Trilingva landlim' 87
Vivo de Andreo Cseh
86
Vizito sur la teron
110
 Libroservo 61, 251
 Lingva politiko 8,
 56, 250
 Lingvaj rajtoj 8, 250
 Lingvolanĉilo 49,
 50, 51
 Lipari, M. 101
 Litovio 42, 114, 151
 Ljubin, M. 88
 Llech-Walter, R. 70
 Lloberas, M.R. 166
 Loke, Fake, Persone
 66, 19, 42, 66, 90,
 114, 150, 210, 235
 Löwenstein, A. 160,
 220
 LP&LP 71, 167, 239
- M**acumoto, K.
 116
 Magalhães, C. 172,
 226
 Magnani, D. 204
 Maĥotin, A. 124
 Malbork 100
 Malferma Tago 11,
 84, 115, 145, 148,
 211, 234
 Malferme 2,27, 51,
 75, 99, 123, 147,
 171, 195, 219, 243
 Mao Zifu 38
 Marciniak, K. 18
 Marček, S. 21, 22, 63,
 122, 146
 Marčeková, L. 63
 Martini, G. 260
 Masao, M. 16
 Mastermann, D. 103
- Matthias, U. 151
 Maurelli, F. 200
 Melnikov, A. 76
 Milton, R.J. 214
 Minich, M. 14
 Miyoshi, E. 187, 204
 Moerbeek-Prins, A.E.
 214
 Mojaev, P. 111, 150
 Molle, J. 253
 Monda Socia Forumo
 133
 Montrealo 123, 204
 Mora, H. 210
 Morita, A. 125
 Morley, T. 53
 Moses, O.G. 69
 Movada Foiro 105,
 131
 Multan 20
- N**ederlando 90,
 141, 248
 Nemere, I. 110
 Nepalo 173
 Ne-Registaraj
 Organizoj 85
 Neves, G. 207
 Niĝerio 69
 Nitobe-Simpozio
 91, 201
 Nourmont, C. 102,
 177, 181, 189, 210
 Novjara mesaĝo 3
 Nov-Zelando 114
- O**ceanio 137, 185
 Ockey, E.P. 94
 Oficiala Informilo 19,
 43, 67, 91, 115, 163,
 211, 235, 256
 Oneŝ, I. 160, 180, 181
 Oomoto 84, 206
 Opulskienė, G. 33
 Oratora Konkurso
 66, 183
 Orellana, R.A. 90,
 141, 235
 Orterer, A. 142
 Oślak, V. 14
 Ó Riain, S. 6, 8, 35
 Øgrim, T. 168
- P**akistano 20, 151
 Parizo 245
 Parzyszek, J., M. 198,
 226
 Pekino 21
 Pennazio, R. 94
 Pessata, D. 44
- Petera, J. 70
 Pietiläinen, J. 12, 83
 Pietrzak, B. 27, 36,
 180, 187, 206, 226
 Pietuchowska, N. 226
 Pilipovič, S. 203
 Pinheiro, C. 135, 141
 Pioró, J. 70
 Piron, C. 81, 99, 148,
 250
 Planado 126
 Pochanke, S. 142
 Poezio 16, 40
 Pollando 34, 66, 100,
 117, 198, 224, 225,
 237
 Popov, K.P. 94
 Poznań, 224
 Premioj:
 – Casandra Pyle 123
 – Degučī 204
 – OSIEK 19, 142, 256
 Projekto Nesto 128
- R**adio 27, 66, 149,
 180, 222
 Ragnarsson, B. 38,
 87, 252
 Rao, A.G. 201
 Rapley, J. 166
 Raznan 236
 Recenzioj 14, 38, 62,
 86, 110, 158, 207,
 230, 252
 Rehoric, D. 166
 Repka, M. 14
 Rio-de-Ĵaneiro 44,
 141
 Rondo Familia 75
 Roterdamo 186, 248
 Rømmesmo, J. 238
 Rumanio 93
 Rusio 68, 124, 210,
- S**amodaj, V. 124
 San-Marino 225
 Sanskrito 211
 Sarandrea, C. 36
 Sárközi, J. 214
 Schröder, I. 85
 Schumann, B. 197
 Scienco, ISAE 129
 Seidemann, E. 70, 94
 Semajno de homaj
 rajtoj kaj de E-o 223
 Semajno de
 Internacia
 Amikeco
 22
 Serrano, P.L. 259
 Sial, S.A. 20,
- Sikosek, Z. M. 230
 Silva, G.A. 238
 Sjöblom, S. 238
 Sloper, M. 160
 Slovakio 21, 66, 164,
 212
 Smith, R. 70
 Sobanski, L. 142
 Sochacki, A. 224, 237
 Societo Zamenhof
 199
 Solly, M. 160
 Spezokonto 157
 Spiritismo 212
 Stanley, M.H. 214,
 257
 Staykova, M. 106
 Steele, T. 106
 Steinberg, M. 70
 Stepniewski, W. 8
 Stoll, M. 94
 Strasburgo 56
 Strümpfel, M. 62
 Subvencioj:
 – Cigno 204
 Suchánek, J. 8
 Sujet, M. 22
 Sutkovoj, V.G. 108
 Svedio 149
 Szekeres, L. 260
 Szilágyi, F. 40
 Szóke E. 70
- Ŝ**emer, J. 78
 Štimec, S. 42, 114,
 118
- T**anabe T. 214
 Teatro 190, 203
 Temesi, I. 94
 Terminologio 9
 Tharme, H. 214
 Thorsen-apogo 151
 Togolando 19
 Tokio 91
 Tonkin, H. 123, 199
 Toonder, J.C.J. den
 142
 Toyoda, M. 214
 Tra la mondo 20, 44,
 68, 92, 116, 164,
 212, 236, 258
 Triolle, R. 85, 245
 Trofeo Fyne 204
 Truskolaski, T. 181,
 187, 226
 Tsuda, Y. 173
 Turvey, E. 22
- U**EA 80, 109, 126-
- 139, 177, 178, 226
 Ukrainio 210, 235
 Unesko 85, 133, 245
 Universitatoj 69, 117,
 224, 225
 Uson, K. 164, 258
 Usono 43, 67, 114,
 123
 Usui, H. 54, 174
- V**ajs, J. 8
 Védrine, A. 142
 Vergara, J.A. 173
 Verstraeten, J. 238
 Veteranoj 76, 103,
 Vikipedio 225
 Vjetnamio 237, 246
 Vojaček, J. 69
 Vujnić, R. 238
- W**alaszek, J.A.,
 225
 Wallström, M. 81
 Wandel, A. 21, 32,
 42, 45, 75, 92, 100,
 114, 150, 156, 205,
 206, 251
 Wang, S. 189
 Wang, T. 259
 Waringhien, G. 112
 Waters, B. 166
 Wells, J. 11
 Wennergren, B. 42,
 111, 114
 Wesołowska, M. 225
 Witdoeck, F. 187
 Withey, D. 22
 Witkam, T. 111
 Wood, R.E. 260
 Woerden, T. van 142
 Wöstemeyer, H. 70
 Wu, G. 114, 150
- X**ian 21
- Y**amazoe, S. 70
 Yaasuo, H. 28
 Yu T. 21
 Yuval, T. 114
- Z**aleski-Zamenhof,
 L.C. 175, 198
 Zamenhof 78
 Zarchy, M. 238
 ZEO-j 104
 Zettier, H.-J. 238
 Zilvar, P. 4, 5, 247
 Zvara, M. 21

SERIO "ORIENTO-OKCIDENTO" de UEA

Serio "Oriento-Okcidento" estas la plej longedaŭra el la kontribuoj de UEA al projektoj de Unesko. En ĝi aperis 43 numeritaj kaj 3 nenumeritaj libroj, tradukitaj el pli ol 20 lingvoj.

- *1. **Malsata ŝtono.** Rabindranath Tagore. El la bengala trad. L. Sinha. Malmö: Eldona Societo E, 1961. 128p.
2. **Rakontoj de Oogai.** Mori Oogai. El la japana trad. Mikami Teruo, Miyamoto Masao, Matuba Kikunobu, Nozima Yasutaro. Tokio: Japana E-Instituto, 1962. Represo 1969. 117p. Bind. €6,00.
- *3. **La naŭzo.** Jean-Paul Sartre. El la franca trad. R. Bernard. Rotterdam: UEA, 1963. 222p.
4. **Kalevala.** Elias Lönnrot. El la finna trad. J.E. Leppäkoski. Helsinki: E-Asocio de Finnlando, 1964. Dua eld. 1985. 392p. Bind. €12,00.
5. **Martín Fierro.** José Hernández. El la hispana trad. E. Sonnenfeld. La Laguna: J. Régulo, 1965. 289p. €6,30.
6. **La tragedio de Reĝo Lear.** William Shakespeare. El la angla trad. K. Kalocsay. Rotterdam: UEA, 1966. 156p. €6,60.
7. **Kvin virinoj de amo.** Ihara Saikaku. El la japana trad. Miyamoto Masao. Oosaka: Pirato, 1966. Dua eld. 1989. 159p. Bind. €16,50.
8. **La spleno de Parizo.** Charles Baudelaire. El la franca trad. P. Lobut. København: Koko, 1967. 122p. €5,40.
9. **El la vivo de Syunkin.** Tanizaki Zyuniti. El la japana trad. Miyamoto Masao kaj Isiguro Teruhiko. Oosaka: Pirato, 1968. 145p. €9,30.
- *10. **La Nobla Korano.** El la araba trad. I. Chiussi. Fotorepreso de la dua eldono, 1977. 20+667p. Dulingva eldono. Bind.
11. **Neĝalando.** Kawabata Yasunari. El la japana trad. Konisi Gaku. Tokio: Japana E-Instituto, 1971. Dua eld. 1992. 119p. €12,90.
- *12. **Je la flanko de la profeto.** Italo Chiussi. Originale en E. Antverpeno: TK, 1978. 362p.
- *13. **Brand.** Henrik Ibsen. El la norvega trad. E. A. Haugen. Antverpeno-La Laguna: TK/Stafeto, 1968. 320p.
14. **La luzidoj.** Luíz Vaz de Camões. El la portugala trad. L. H. Knoedt. Chapecó: Fonto, 1980. 464p. €27,90.
- *15. **Elektitaj fabloj.** Ivan A. Krilov. El la rusa trad. S.G. Rublov. Antverpeno-La Laguna: TK/Stafeto, 1979. 336p.
16. **La sonetoj.** William Shakespeare. El la angla trad. W. Auld. Pizo: Edistudio, 1981. 326p. Bind. Dulingva eldono. €12,00.
- *17. **Tutmonda sonoro.** El diversaj lingvoj trad. K. Kalocsay. Budapeŝto: Hungara E-Asocio, 1981. Duvoluma. 664p. Bind.
18. **Elpafu la sagon.** El diversaj lingvoj trad. T. Sekelj. Rotterdam: UEA, 1983. 188p. Broŝ. €7,50. Bind. €9,60.
19. **La suferoj de la juna Werther.** J.W. von Goethe. El la germana trad. R. Hauptenthal. Heckendalheim: Berthold Faber, 1984. 92p. Bind. €16,50.
20. **Loulankaj Fremdregionano.** Inoue Yasushi. El la japana trad. Miyamoto Masao. Tokio: Japana E-Instituto, 1984. 96p. €13,50.
- *21. **Montara vilaĝo.** Chun-Chan Yeh. El la angla trad. W. Auld. Pekino: Ĉina E-Eldonejo, 1984. 264p. Bind.
- *22. **Sinjoro Tadeo.** Adam Mickiewicz. El la pola trad. A. Grabowski. Varsovio: Pola E-Asocio, 1986. 333p.
- *23. **Sanga nupto kaj La domo de Bernarda Alba.** Federico García Lorca. El la hispana trad. M. Fernández. Madrid: Ediciones La Misma, 1987. 229p.
24. **Laŭdo de l' stulteco.** Erasmo de Roterdamo. El la latina trad. G. Berveling. Rotterdam: UEA, 1988. 111p. €6,00.
25. **Aŭstralia antologio.** Redaktis A. Towsey. El la angla trad. diversaj. Pizo: Edistudio, 1988. 431p. Bind. €21,00.
- *26. **La majstro kaj Margarita.** Mihail Afanasjeviĉ Bulgakov. El la rusa trad. S.B. Pokrovskij. Sverdlovsk: Sezonoj, 1991. 376p. Bind.
- *27. **Cent jaroj da soleco.** Gabriel García Márquez. El la hispana trad. F. de Diego. Chapecó: Fonto, 1992. 372p.
- *28. **Krimo kaj puno.** Fjodor Dostojevski. El la rusa trad. A. Parfentjev. Jekaterinburg: Sezonoj, 1993. 488p. Bind.
29. **Klera edzino.** Upendronath Gangopadhae. El la bengala trad. P. Daŝgupto. Piza: Edistudio, 1994. 182p. Bind. €12,00.
30. **Antologio Latina – Volumoj 1 kaj 2.** Kompilis kaj trad. G. Berveling. Chapecó: Fonto, 1998. 576p. €31,80.
31. **La metamorfozo.** Franz Kafka. Trad. M. Nervi. Piza: Edistudio, 1996. 75p. Bind. €12,00.
32. **Malvivaj animoj.** Nikolaj V. Gogol. El la rusa trad. V. Vyĉegjanin. Jekaterinburg: Sezonoj, 2001. 223p. Bind. €18,00.
33. **La lada tambureto.** Günter Grass. El la germana trad. T. Chmielik. Bielsko-Biala: Kleks, 2000. 533p. Bind. €36,00.
34. **La libro de la mirindaĵoj.** Marko Polo. Trad. D. Moirand. Rotterdam: UEA, 2001. 445p. €33,00.
35. **Ĉe akvorando.** El la ĉina trad. Laŭlum. Beijing: Ĉina Fremdlingva Eldonejo, 2004. 1830p. Tri volumoj. €120,00.
36. **La Dharmo-pado.** El la palia trad. G. Gälmo. Stockholm: Eldona Societo E, 2002. 110p. Bind. €18,00.
- *37. **Sensorteco.** Imre Kertész. El la hungara trad. I. Ertl. Budapeŝto: Eldonejo Aranygolyó, 2003. 207p. Bind.
38. **Aventuroj de la brava soldato Ŝvejk dum la mondmilito.** Jaroslav Hašek. El la ĉeĥa trad. V. Vaňa. Dobřichovice: KAVA-PECH, 2004. 711p. Bind. €39,00.
39. **Leteroj de Paŭlo kaj lia skolo.** El la helena trad. G. Berveling. Chapecó: Fonto, 2004. 253p. €19,50.
40. **Eŭgeno Onegin.** Aleksandr Puŝkin. El la rusa trad. V. Melnikov. Kaliningrado: Sezonoj, 2005. 256p. €19,80.
41. **La gefanĉoj.** Alessandro Manzoni. El la itala trad. B. Cadei. Milano: IEF, 2006. 495p. €30,00.
42. **La princo.** Niccolò Machiavelli. El la itala trad. C. Minnaja. Milano: IEF, 2006. 103p. €11,10.
43. **Fraŭlino Maitreyi.** Mircea Eliade. El la rumana trad. I. Onet. Rotterdam: Bero, 2007. 200p. €15,00.

SENNUMERAJ:

- La Dia Komedio.** Dante Alighieri. El la itala trad. G. Peterlongo. Milano: Edizione S.I.E.I., 1963. Dua eldono, 1979. 55+709p. Luksa dulingva eldono. Bind. €30,90.
- Aniario.** Harry Martinson. El la sveda trad. W. Auld kaj B. Nilsson. Malmö: Eldona Societo E, 1979. 174p. Bind. €12,00.
- Biblio.** Trad. L.L. Zamenhof, G. Berveling, J.C. Rust, B.J. Beveridge, C.G. Wilkinson. Dobřichovice: KAVA-PECH, 2006. 1375p. Bind. €20,10.

* elĉerpita

Sesona rabato por ajna kombino de tri libroj, identaj aŭ ne, sendotaj samtempe al la sama adreso. Ĉi tiu oferto validas ĝis la 1-a de februaro 2008.

speciala oferto jarfina

ĈU LINGVA IMPERIISMO?



Ĉu nur-angla Eŭropo? Defio al lingva politiko.
Robert Phillipson. Trad. István Ertl. Rotterdam: UEA, 2004.
254p. 22cm. Prezo: €21,00.

KIO ESTU NIA LINGVOPOLITIKO?



Por aktiva lingvopolitiko. Aktoj de la lingvopolitika seminario en la 81a UK, Prago 1996. Red. D. Blanke, R. McCoy kaj O. Buller. Rotterdam: UEA, 1999. 71p. Prezo: €7,20.

POR LERNI KAJ ARGUMENTI

Al lingva demokratio. Aktoj de la 1-a Nitobe-Simpozio de Internaciaj Organizaĵoj, Prago, 1996. Red. Mark Fettes kaj Suzanne Bolduc. Rotterdam: UEA, 1998. 212p. 24cm. ISBN 92 9017 054 9. Trilingva: (E, angla, franca). Prezo: €10,20.



POR ŜANĜI LA SITUACION

Al nova internacia lingva ordo. Aktoj de la 3-a Nitobe-Simpozio de Internaciaj Organizaĵoj, Pekino, 2004. Red. Lee Chong-Yeong kaj Liu Haitao. Rotterdam: UEA, 2004. 239p. 24cm. ISBN 92 9017 085 9. Trilingva (E, angla, ĉina). Prezo: €18,00.



Triona rabato por ajna kombino de tri libroj, identaj aŭ ne, sendotaj samtempe al la sama adreso. Oferto valida ĝis 31 decembro 2007.